**Paiva Netto skribas:** “Legio de Bona Volo kaj la Ideologio de la Bona Samariano”

# BONA VOLO

www.bonavolo.com

La Revuo de la Ekumena Spiritualeco • 24-a jaro • N-ro 67

ELEVAÇÃO




**Ekde la 1-a de januaro 1950 (Tago de Universala Kunfratiĝo), Legio de Bona Volo kontribuas al la memsubtena elvolviĝo en la tuta mondo per la avangarda influo de Edukado kun Ekumena Spiritualeco.**

**Scienco:** Newton, Einstein kaj "la perspektivo de kono".

# Kunlaborante kun LBV, Vi helpas konstrui pli bonan mondon!

















BANKO SANTANDER Bankokodo: 0239 • Kontnumero: 13002754-6

BANKO HSBC Bankokodo: 0343 • Kontnumero: 63275-24

**CENTRA SIDEJO:** Rua Sérgio Tomás, 740 • Bom Retiro • São Paulo/SP • Brazilo • CEP 01131-010 • Tel.: (+5511) 3225-4500 • www.lbv.org • **LBV DE ARGENTINO:** Calle José Mármol 964 • Boedo • Buenos Aires • CPA C1236ABL • Tel: (+5411) 4925-5000 • **LBV DE BOLIVIO:** Calle Asunta Bozo Bistrot 520 • Zona Alto Obrajes (sector A) • La Paz • Casilla de Correo 5951 • Tel: (+5912) 273-3759 • **LBV DE USONO**: 20 Calumet Street • Newark/NJ • Zip Code 07105 • Tel.: (+1973) 344-5338 • **LBV DE PARAGVAJO:** Calle Curupayty, 1452 c/ Mayor Bullo Cerro Corá • Ciudad de Lambaré • Tel.: (+59521) 921-100/03 • **LBV DE PORTUGALIO:** Rua Alexandre Herculano, 355 • Freguesia do Bonfim • Porto • CP 4000-055 • Tel.: (+35122) 208-6494 • **LBV DE URUGVAJO:** Av. Agraciada, 2328 • Aguada • Montevideo • CP 11800 • Tel.: (+5982) 924-2790

ELEVAÇÃO

BONA VOLO

24-a jaro• N-ro 67

BONA VOLO estas kvarmonata publikigaĵo de LBV, eldonita de Eldonejo Elevação. Ĝi estas registrita per n-ro 18166, la 16-an/3/2006, sur la libro "B" de la 9-a Notario pri Registro de Biloj kaj Dokumentoj de San-Paŭlo, Brazilo.

**DIREKTORO KAJ ĈEFELDONISTO:** Francisco Periotto MTE/DRTE/RJ 19.916 JP

**ĜENERALAJ KUNORDIGANTOJ:** Gerdeilson Botelho kaj Rodrigo de Oliveira

**SKIPO DE ELDONEJO ELEVAÇÃO:** Adriane Schirmer, Ana Paula de Oliveira, Angélica Periotto, Cida Linares, Felipe Duarte, Jefferson Rodrigues, Jéssica Botelho, Jéssica Domingues, José Roberto Tenório da Silva, Leila Marco, Letícia Rio, Maria Aparecida da Silva, Neuza Alves, Paulo César Pereira, Paulo Sérgio Viana, Raquel Bertolin, Rosana Bertolin, Natália Lombardi, Silvana Bosso, Walter Periotto kaj Wanderly Albieri.

**KOVRILO:** Jonny César

**GRAFIKA PROJEKTO KAJ KOMPOSTADO:** Felipe Tonin, Diego Alves kaj Kátia Borba

**ĈIUJ RAJTOJ DE TIU ĈI ELDONO REZERVITAJ DE EDITORA ELEVAÇÃO:** Rua Doraci, 90 • Bom Retiro • São Paulo/SP • Brazilo • CEP 01134-050 • Tel.: (+55 11) 3225-4969 • Fax: (+55 11) 3358-6882 • www.bonavolo.com

## Pripenso de Bona Volo

"En ĉi tiu periodo, kiam la mondo kurbiĝas sub la danĝero de kompleta neniiĝo, Politiko, Religio, Filozofio, Scienco, Ekonomio, Arto, Sporto, k.a., kvazaŭ petegas profundan transformiĝon: tiel ke ĝi havu kiel standardon Ekumenismon de Frateco, kiun oni neniam malsuprenigu."

Paiva Netto

# Traktataĵo pri la Nova Ordono de Jesuo

Instruis la Ekumena Kristo, la Dia Ŝtatisto: *"Novan Ordonon Mi donas al vi: Vi amu unu alian, kiel Mi vin amis. Nur per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havos Amon unu al alia. Jen estas mia Ordono: ke vi amu unu alian tiel same, kiel Mi vin amas. Neniu havas Amon pli grandan ol tio, ke iu demetus sian Vivon por siaj amikoj. Vi estas miaj amikoj, se vi faras tion, kion Mi al vi ordonas. Kaj Mi tion ordonas: vi amu unu alian, kiel Mi vin amis. Mi jam ne nomas vin sklavoj, ĉar la sklavo ne scias, kion lia sinjoro faras; sed Mi nomis vin amikoj, ĉar ĉion, kion Mi lernis de mia Patro, Mi sciigis al vi. Vi ne elektis min, sed Mi elektis vin, kaj starigis vin, por ke vi iru kaj donu bonan frukton, kaj ke via frukto daŭru; por ke la Patro donu al vi ĉion ajn, kion vi petos de Li en mia nomo. Tion Mi ordonas al vi, ke vi amu unu la alian, kiel Mi amas vin. Kiel la Patro min amas, tiel Mi ankaŭ vin amas. Restadu en mia Amo".*

(Arangîta de Paiva Netto, akorde kun la Evangelio de la Kristo de Dio laŭ **Johano**, 13: 34 kaj 35; 15: 12 ĝis 17 kaj 9).

**4** Legio de Bona Volo kaj la Ideologio de la Bona Samariano
Paiva Netto

**12** Leteroj, retpoŝtoj kaj registroj
Esperantistoj skribas al BONA VOLO


**18** Komunikiloj
LBV kaj Esperanto kunplektas la manojn

**24** Junulara Agado
Perforto en amaskomunikiloj

**27** LBV estas agado
Ekumena Frateco kie la popolo bezonas

**35** Opinio
Newton, Einstein kaj "la perspektivo de kono"

**38** Soldatetoj de Dio



















# Legio de B
## kaj la Ideologio de

Fotoj: Arkivo BV



João Preda

José de Paiva Netto, verkisto, ĵurnalisto, radiopreleganto, komponisto kaj poeto. Li naskiĝis je la 2-a de marto 1941, en Rio-de-Ĵanejro/RJ, Brazilo. Li estas direktoro-prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV). Estas aktiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI), de Internacia, Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI–Inter), ano de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj de Subŝtato Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Verkistoj de Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Radiokomunikantoj de Subŝtato Rio-de-Ĵanejro, de Beletra Akademio en Centra Brazilo kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC).



# Bona Volo
# la Bona Samariano

Miaj Geamikoj kaj Gefratoj, je la 1-a de januaro 1950, en la Tago de Universala Kunfratiĝo, Legio de Bona Volo (LBV) aperis sur la Tero sub la inspiro kaj aŭspicio de paroloj kaj ekzemplado de Nia Sinjoro Jesuo Kristo. Ĝia precipa fundamento staras en la Evangelio-Apokalipso de la Ĉiela Gvidanto.

Mi esprimas mian ĉiaman kontentiĝon, ke mi vidas, en la sino de la popolo ĝian latentan, firman ĉeeston, kontribue al memsubtena elvolviĝo de la brazila socio, per ĝia influo en la kampo de Edukado kun Spiritualeco kaj ĝian kreskantan plivastiĝon tra la mondo.

## LBV estas ankaŭ Komunikado


En ĉi tiu dato historia por tiuj, kiuj havas Bonan Volon, mi denove klare rememoras tiun matenon de la 29-a de junio 1956, kiam mi aŭdis per Radio Tamoyo, el Rio-de-Ĵanejro, ke **Alziro Zarur** (1914-1979) parolas pri la misio de LBV en helpado al la simpluloj kaj en preparado de vojoj por la Triumfa Reveno de la Kristo de Dio. Tiutempe oni fervore kampanjis por aĉeto de Radistacio Bona Volo (antaŭe Radio Mundial),


Alziro Zarur

kiun fine oni ja aĉetis. Kaj koncerne la preparon por la reveno de la Dia Majstro – kiel Lin nomis Sankta **Francisko el Asizo** (1181-1226), Patrono de LBV – tio signifas ankaŭ senĉese disanonci Lian Evangelion-Apokalipson laŭ Spirito kaj Vero, nome, ne "laŭlitere"*[1], kio eble kaŭzas katastrofon nomatan fanatikeco. Sed sub la lumo de Lia Nova Ordono – Leĝo de Universala Amo – kio signifas intensan travivadon de Liaj paroloj kaj ekzemploj, sen spito pri aliaj vojoj. Konsideri sin ekskluziva posedanto de vero similas restadon flanke de mensogo. Nu, la miraklo, kiun Dio esperas vidi ĉe la Homoj estas tio, ke ili lernu ami sin reciproke.

Tial Jesuo jam diris:

— *Vi amu unu alian, kiel Mi vin amis. Nur per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havos Amon unu al alia. (...) Neniu havas Amon pli grandan ol tio, ke iu demetus sian Vivon por siaj amikoj. (...) Kiel la Patro min amas, tiel Mi ankaŭ vin amas. Restadu en mia Amo* (Evangelio de la Kristo, laŭ **Johano**, 13: 34 kaj 35; 15: 12, 13 kaj 9).




LBV estas ankaŭ Komunikado! Ĝia heroa sagao ne limiĝas al helpado al tiuj, kiuj stomake malsatas, sed ampleksas spiritan subtenon, ĉar kun Spirito reformita per klarigado de Diaj Aferoj kaj per pedagogia amemo, ĉio sin direktas al pliboniĝo. Ĝi laboras por Edukado kaj Klereco, Nutrado, Sekureco, Sano kaj Laboro kun Ekumena Spiritualeco.

## Bela leciono de la Kristo

Kiam mi parolis al simpatia ĉeestantaro, en la jaro 1991, en Portugalio, mi sciigis, ke kiam mi ankoraŭ estis knabo mi ricevis la unuan informon pri la Sankta Biblio, aparte pri la Bona Novaĵo*[2] de Jesuo, pere de mia karmemora patro **Bruno Simões de Paiva** (1911-2000). Li parolis al mi pri emociiga rakonto donita al la popolo fare de la Kristo de Dio: **Parabolo pri la Bona Samariano.** Kaj li legis ĝin al mi. Tiu peco troviĝas en la Evangelio laŭ **Luko**, 10: 25 ĝis 37:

*[1] **Laŭlitere** – Dua Epistolo de Paŭlo al la Korintanoj, 3:6 – *"La litero mortigas, sed la spirito vivigas".*
*[2] **Bona Novaĵo (de Jesuo)** – Evangelio signifas Bonan Novaĵon.

## *Klarigo pri logotipo de LBV*





*LBV*

- *La krucformaj komencliteroj reprezentas esprimon de Fido*
- ***Formo de Koro***
*La insigno, laŭ formo de koro, simbolas Fratan Amon por la unuiĝo inter la popoloj en la tuta mondo.*
- ***34 ĉeneroj***
*Ili esprimas la ĉenon de Reala Frateco inter ĉiuj Religioj kaj Filozofioj, kaj aludas al la paragrafo 34 de ĉapitro 13 de la Evangelio de la Kristo de Dio laŭ Johano, en kiu oni trovas la Novan Ordonon de Jesuo.*
- ***Portugallingva mesaĝo ene de la koro:***
***Paco sur la Tero al la Homoj de Bona Volo***
*Kanto de la Anĝeloj el la Ĉiela Gvardio, kiam ili anoncis la Naskiĝon de Jesuo, la Ekumena Kristo, la Dia Ŝtatisto (Evangelio laŭ Luko, 2:14).*

## Sociala Pririgardo*

La grafikaĵo montras la rimarkindan kvanton da sociedukaj asistadoj realigitaj de Legio de Bona Volo dum la lastaj 5 jaroj:




* LBV estis la unua filantropia institucio en la lando bilancita de Sendependaj Eksteraj Revizoroj (Walter Heuer), laŭ iniciato de Paiva Netto, pli frue ol tio fariĝos deviga laŭ leĝa postulo.

** Asistadoj kaj Bonhavaĵoj

*25 Kaj jen unu leĝisto stariĝis kaj tentis Jesuon, dirante: Majstro, kion mi faru por heredi eternan Vivon?*

*26 Kaj Jesuo diris al li: Kio estas skribita en la leĝo? Kiel vi legas?*

*27 Kaj la leĝisto responde diris al Li: Amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj per viva tuta Animo kaj per via tuta forto kaj per via tuta menso, kaj vian proksimulon kiel vin mem*[*3]*.*

*28 Kaj Jesuo diris al li: Vi prave respondis; tion faru kaj vi vivos.*

*29 Sed la leĝisto, dezirante pravigi sin, diris al Jesuo: Kaj kiu estas, Jesuo, mia proksimulo?*

*30 La Majstro respondis rakontante al li parabolon: Unu homo malsupreniris de Jerusalem al Jeriĥo; kaj li falis en la manojn de rabistoj, kiuj lin senvestigis kaj batis, kaj foriris, lasante lin duone senviva.*

*31 Kaj laŭ okazo unu pastro malsupreniris la saman vojon; kaj lin vidinte li preterpasis aliflanke.*

*32 Kaj tiel same unu levido, veninte al la loko kaj lin vidinte, preterpasis aliflanke.*

*33 Sed unu samariano, vojaĝante, alvenis tien, kie li estis, kaj lin ekvidinte, li kortuŝiĝis,*

*34 kaj alproksimiĝis, kaj bandaĝis liajn vundojn, kaj surverŝis oleon kaj vinon; kaj metis lin sur sian beston, kaj kondukis lin al gastejo, kaj zorgis pri li.*

*35 Kaj la morgaŭan tagon li elprenis du denarojn (antikva roma monero) kaj donis ilin al la gastejestro, kaj diris: Zorgu pri li, kaj kion pli vi elspezos, mi tion repagos al vi, kiam mi revenos.*

*36 Kiu el tiuj tri, laŭ via opinio, — demandis Jesuo al la leĝisto — sin montris proksimulo de tiu, kiu falis en la manojn de la rabistoj?*

*37 Kaj tiu la leĝisto respondis: Certe tiu, kiu faris al li kompaton. Kaj Jesuo trankvile diris al li: Iru vi, kaj faru tion saman.*






Kiam mi relegas tiun Parabolon, tiam mi meditas, profunde tuŝita je mia Animo, pri tiu plia bela leciono de la Ekumena Kristo, Tiu, kiu pretas helpi ĉian bezonanton en liaj suferoj, kaj kiu atentigis min pri la valoro de Solidareco, kaj pretigis min, je mia tuta koro, kiam mi estis ankoraŭ adoleskanto, por partopreni tiun dian entreprenon (Legio de Bona Volo), kaj neniam forlasi ĝin. Nu, ni lernas kun Jesuo persistadon ĝis la fino:

— *Per via pacienco vi savos viajn animojn.* (Evangelio de Jesuo laŭ Luko, 21:19).


Cetere, por homoj de Bona Volo, obstinadi sur la Vojo al la Sinjoro signifas elvolviĝi trans la tiel nomatan homan finon, ĉar la Vivo daŭras, ĉar mortintoj fakte ne mortis. Eĉ ateistaj Fratoj, inter kiuj ekzistas homoj rafinite grandanimaj.




[*3] *"Amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj per viva tuta Animo kaj per via tuta forto kaj per via tuta menso, kaj vian proksimulon kiel vin mem"** – **Levidoj**, 19:18.


Goeto


Voltero


Cicerono


Konfuceo


Demokrito


Zoroastro

Nu, jen mi staras ĉi tie, dum pli ol duono de jarcento en laborado por la Institucioj de Bona Volo kaj treege feliĉa flanke de Vi ĉiuj, ke mi povas servi al tiu Sublima Kaŭzo, kies devizo estas, de la komenco, por iu pli bona Brazilo kaj por iu pli feliĉa Homaro. Min subtenas la persistado instruita de la Dia Laboristo per Lia Bona Novaĵo de liberigo. Mi ĉiam havas en la menso gravan admonon de la filozofo **Goeto** (1749-1832), germana geniulo, kiu prilumis la mondon en la 18-a kaj 19-a jarcentoj. La aŭtoro de *Faŭsto* diris:

— *Ne sufiĉas koni, oni devas apliki. Ne sufiĉas deziri, oni devas fari.*

## La vera maniero ekzisti

Revene al la leciono de la Parabolo, oni vidas ĉe la konduto de tiu samariano (reprezentanto de neaprezata komunumo, tiutempe) la veran manieron, kiel vivas solidara civitano, kiel de jardekoj ni ĉi tie predikas. Tiu rakonto evidentigas, ke ne sufiĉas nur eduki. Estas nepre necesa la spiritigo de la homo kaj krome esprimado al ĉiuj Homoj kaj Spiritoj pri la graveco de amo, de interkompreno, por ke ekzistu ia efektive frateca socio. La defiema **Voltero** (1694-1778) asertis per la verko *Érphyle*, akto III, sceno 20:







— *Mortemuloj estas ĉiuj egalaj. Ne la naskiĝo, sed virto starigas diferencon inter ili.*

**Cicerono** (106-43 a.K.), unu el la plej respektataj romaj oratoroj kaj politikaj pensuloj, kongruas kun mia rezonado, kiam li asertas, ke:

— *Homoj devas fari nur tion, kio estas utila al ili mem, sed ankaŭ utila al la ceteraj homoj.*

Tiuj modeloj, kiujn mi venigas al vi eble ŝajnas romantikaj al la praktikaj homoj (kompreneble, mi aludas al homoj sen Frateco, ĉar ekzistas tiuj, kiuj havas la Animon plena je bonkoraj sentoj). Cetere, foje mi diris al grupo da amikoj la jenon: Jes, oni estu idealisto. Sed bonvolu, kun talento kaj pragmatismo. Necesas havi idealon kaj **precipe esti kapabla realigi ĝin**, por plu meriti la benon de Dio.

Brazilo fariĝos Koro de la Mondo kaj Patrolando de Ekumena Evangelio, kiam tiaj ecoj estos ordinaraj inter ĝiaj enloĝantoj. Tiam, ĝi efektive transformiĝos en la mondan grenprovizejon. Ne nur koncerne la tritikon, kiun oni elplukas el la grundo, sed tiun, kiun oni elplukas el la Animo.

Kiam mi mencias la Bonan Mesaĝon de Jesuo, mi ne komprenas ĝin kiel posedaĵon de unu privilegia parto de la Homaro. La **morala** lingvaĵo, kiun Li transdonas apartenas al ĉiuj koroj, kiuj batalas por iu pli elkora mondo.


Kaj, en ĉiuj tempoj, multaj elstaraj homoj en la Historio uzis kiel temojn por siaj pensoj la plej admirindajn sentojn, kiujn la Homo povas esprimi. En tempo de tiom da hedonismo kiel la nuna tempo, estas oportune rememori kelkajn el tiuj pensoj:


Graça Aranha


Seneko


Samuel Coleridge


Antisteno


Aristotelo


Jean de La Bruyére

— *Suferigu neniun: ĉiuj estas idoj de la sama Dio. (...) Faciligi bonan agon estas la samo kiel praktiki ĝin.*

Profeto **Mahometo** (570-632 a.K.) – *Paco kaj beno de Dio estu ĉe li!*

— *Se la homoj metus devon sur la unuan lokon kaj sukceson posten, ĉu ili ne plibonigos la karakteron?*

**Konfuceo** (551-479 a.K.)

— *La Homo ne estas malfeliĉa, se li agas juste.*

**Demokrito** (460-370 a.K.)

— *Plej granda kaj plej bona princo estas tiu, kiu havas sub sia regado plej fekundan grundon.*

**Zoroastro** (628-551 a.K.)

— *Kiu transformas en belecon ĉiajn emociojn, ĉu la melankoliajn, ĉu la malĝojajn, ĉu la plezurajn, ĉu la dolorajn, tiu vivadas en ĉiama ĝojo.*

**José Pereira de Graça Aranha** (1868-1931)

— *Kie ajn ekzistas unu homo, tie estas oportuna okazo por esti grandanima.*

**Seneko** (4 a.K. – 65 p.K.)

— *Grandanimeco kaj bonkoreco ne estas rimedoj, ili estas celoj.*


**Samuel Taylor Coleridge** (1772-1834)


— *Rekono estas la memoro de la koro.*

**Antisteno** (444-365 a.K.)

— *Unua virto estas justeco.*

**Aristotelo** (384-322 a.K.)


Coelho Neto


Edmund Burke


Blaise Pascal

— *Nenio pli oportune refreŝigas la sangon ol bona ago.*

**Jean M. de La Bruyère** (1645-1696)

— *Se genio estas granda, bonkoreco estas eminenta; plej digna homo estas tiu, kiu plej ofte okupiĝas pri la ĝenerala bonfarto, kaj emas per la forto de sia spirito reĝustigi malbonon kaj malpliigi la suferadon de malfeliĉuloj.*

**Coelho Neto** (1864-1934)

Mi memoras ankaŭ frazon de **Edmund Burke** (1729-1797), kiu perfekte kongruas kun tio, kion mi senpretende diras al vi:

— *Por ke malbono venku, sufiĉas, ke bonaj homoj restadu kun la brakoj krucitaj.*

Kompreneble, per tiaj vortoj Burke kontraŭbatalas la malbonon de senkuraĝeco.

Estas ĉi tie oportuna alia penso de la granda filozofo Konfuceo, ĉar ni defendas Pacon, ne senpunon:


— *Oni pagu Bonon per Bono, sed malbonon per Justo.*

Koncerne la ĝustan uzadon de tiu instruo de la ĉina saĝulo, la sciencisto kaj matematikisto **Blaise Pascal** (1623-1662) admonas nin pri la necesa simetrio inter vigleco kaj ĝusteco:

— *Justeco sen forto estas senpova; forto sen justeco estas tirana. Necesas do, ke oni harmoniigu justecon kaj forton, por ke fortulo estu justa kaj justulo estu forta.*

## Malforteco de la Homo kaj Dia Providenco

(...) Antaŭ tio, nenio estas pli bona ol aŭskulti la versiklojn 12 kaj 16 de Psalmo 90, nome la "Preĝon de **Moseo**, homo de Dio":



Moseo

*12 Instruu nin kalkuli niajn tagojn, por ke ni atingu saĝan koron.*

*16 Al viaj sklavoj aperu viaj faroj, kaj via beleco al iliaj infanoj.*

## Nia destino

Mi alportas al vi, ĉar ĝi estas oportuna, paĝon atribuatan al **Charles Chaplin** (1889-1977) – afable senditan de mia bela kuzino **Ana Paula Bomfim Kistmann**, kiu loĝas en Usono.


Charles Chaplin

Chaplin, unu el la plej grandaj geniuloj en kinarto, montras, ke la Homo devas tenadi en sia menso kaj en sia koro, eĉ fronte al vivotempestoj, la intencon antaŭeniri.


Ana Paula Kistmann

— *Hodiaŭ mi ellitiĝis pensante pri tio, kion mi devas fari antaŭ ol la horloĝo signu la noktomezon. Estas mia tasko elekti, kian tagon mi havos hodiaŭ. Mi povas plendi, ke pluvas aŭ danki la akvon, kiu forportas medimalpuraĵojn. Mi povas malĝoji, ke mi ne havas monon aŭ kuraĝe administri miajn posedaĵojn kaj eviti malŝparadon. Mi povas plendi pri mia malbona sano aŭ danki, ke mi vivas. Mi povas plendi pri miaj gepatroj, ke ili ne donis al mi tion, kion mi volis, aŭ mi povas danki, ke mi naskiĝis. Mi povas plendi, ke mi devas labori aŭ danki, ke mi havas laboron. Mi povas enui pro endoma laboro aŭ danki Dion, ke mi havas domon por loĝado. Mi povas bedaŭri pro elreviĝoj kun amikoj aŭ entuziasmi pro la ebleco akiri al mi novajn amikojn. Se ne ĉio okazos laŭ mia plano, mi povas fariĝi feliĉa, ke mi hodiaŭ povas rekomenci. Unu tago staras antaŭ mi, kaj atendas, por esti tio, kion mi volas. Kaj jen ĉi tie mi staras, la skulptisto, kiu povas doni al ĝi formon. Ĉio dependas de mi!*


Victor Hugo

La saĝa **Victor Hugo** (1802-1885) pravis:

— *Tiuj homoj, kiuj hodiaŭ asertas, ke fari ion estas neeble, tiuj implice staras flanke de malvenkontoj.*

## Danko

Miajn sincerajn dankojn al ĉiuj, kiuj kunlaboradas por la sukceso de LBV: volontuloj kaj kontribuantoj. Nian plej grandan dankon, ankaŭ al aŭtoritatuloj, al religiuloj, al ateistoj, al artistoj, al amaskomunikiloj. Fine, al ĉiuj homoj de Bona Volo, kiuj helpas nin. Al partoprenantoj en la Klubo Kulturo de Paco, mian stimulon. Al subtenantoj de Religio de Dio, Kristanoj de la Nova Ordono de Ekumena Jesuo, la Dia Ŝtatestro, kiu instruis al ĉiuj homoj la helpadon al proksimulo, kun rekomendo, ke oni amu eĉ malamikojn (Evangelio laŭ Luko, 6: 27), mian stimulon. Al ĉiuj mi emfaze esprimas miajn dezirojn, ke ili havu vivon plenan je sukcesaj agoj, spirite kaj home, sub la lumo de Paco, de Frateco, de Vero kaj de Justeco, ĉar tion aludis **Rui Barbosa** (1849-1923):

— *Ĉi tiu vorto – Justeco – entenas preskaŭ tute la ideon pri nia feliĉo sur la Tero. Ĝi estas la substanco de civilizo, esenco de socio, resumo de kristana politiko. Nacioj burĝonas aŭ ne burĝonas, laŭ tio, ĉu ili scipovas aŭ ne scipovas ĝin konservi.*


Rui Barbosa

**Kiu fidas Jesuon ne perdas sian tempon, ĉar Li estas la Granda Amiko, kiu ne forlasas amikon meze de la vojo.** ■

# TEMPLO DE BONA VOLO

## Unu el la Sep Mirindaĵoj de la Brazila Ĉefurbo



KELKAJ EL LA MEDIOJ

VIZITU ANKAŬ VI

SGAS 915, LOTES 75/76 – BRAZILJO/DF – BRAZILO

INFORMOJ: (+55 61) 3245-1070 / WWW.TBV.COM.BR/ESPERANTO



Fotokopio de Portalo Bona Volo, je la 15-a de decembro 2010 omaĝe al la Esperanto-Tago

# Legu mesaĝojn pri Planeda Civitaneco per www.bonavolo.com

**Pro neebleco publikigi ĉiujn retpoŝtajn mesaĝojn kaj leterojn senditajn al la ĉefgvidanto de LBV kaj al revuo *BONA VOLO*, ni dankas, per ĉi tiu eldono, kelkajn el ili kiel maniero reprezenti ĉiujn:**

## AMERIKOJ

Estas sendube tre altvalora la helpo kiun la LBV oferas al nia Esperanto-movado, fako de la politiko de la kunlaboro praktikota pro la paco. Mi observas la bonan volon kiun adoptas S-ro Paiva Netto, ekzemple de la neforgesebla frato Zarur. Antaŭen!

***(Antonio Carlos de Martins Mello, Brazilo)***

Kia bela estas la granda Templo de Bona Volo, ĉu? (...). Mi profitas por gratulegi al LBV pro ĝia senĉesa laboro pri e-disvastigo kaj pro diskongo de agado de la paco pere de la Evangelio de la Majstro JESUO, tra monde. Ĝis ĉiam kaj fratan brakumon.

***(Evandro Caboclo, Brazilo)***

Saluton al ĉiuj! Mi memoras, ke mi estis infano, kiam, ĉe mia patrina avino, mi aŭdis radielsendojn de LBV. Agrabla memoro. Kiam mi kaj mia edzino ĉeestis Brasília en la jaro 2004, ni vizitis la Templon de Bona Volo, tre belan. Gratulon al LBV por la 60-jariĝo. Tre malmultaj estas tiaj institucioj kiuj vivas kaj laboras tiel longe. Amike via.

***(Henrique Braga, Brazilo)***

En la jaro 1962, dum kiam mi legadis la revueton "Soldatetoj de Dio", publikigitan de nia kara LBV, mi havis la unuan konon pri la internacia lingvo Esperanto. Zamenhof multe faris por ni, sed ĝis nun ni ne sukcesis kompreni lin. Mi petas al nia Frato Paiva Netto, ke li daŭrigu tian belan agadon, ĉar oni ankaŭe prokrastas kompreni la Evangelion de Jesuo.

***(Manoel Moacir Sisccati [1945-2010], Brazilo)***

Mi tutkore deziras plenan sukceson al la Internacia Forumon de la Agema Gejunularo de la Bona Volo de Dio organizata de vi ĉiuj, pere de tiu ĉi elektronika poŝto mi sendas miajn plej sincerajn dezirojn pri sano, ekumena frateco kaj amo, ke niaj gejunuloj ĉiam amu Dion kaj la pacon. (...) Mi deziras sendi mesaĝon al retanoj de LBV. Tre korĝojigan saluton.

***(Martín Castro López, Kubo)***

**(Brazilo)** Adeir Ferreira, Antônio Félix da Silva, Clayton Pereira, Darly Viganó, Elísia Martins de Oliveira, Eni A. Oliveira, Eurípedes Alves Barbosa, Evandro Avellar, Fabiano Henrique, Felipe de Oliveira Queiroz, Genildo Coelho, Geraldo Mattos, Hamilton Nery, Jair Salles, José Carlos Valim, José Saraiva Matos, Ladislau Afonso, Maria Aparecida de Araújo Martins, Nédio Leon Rosa, Rogério Ferreira, Said Pontes de Albuquerque, Sandra Maria, Silvio Marcio Camargo Bruno, Vicente Paulo Werneck, Walter Rosa Fontes – **(Kanado)** Brian D Kaneen, Kim Keeble, Raymond Brisebois – **(Kubo)** Eduardo Robert, Fernando A. Paredes – **(Peruo)** Carlos Miranda – **(Urugvajo)** Sonia Risso – **(Usono)** Humphrey Tonkin, Neil Blonstein, Stechjo Schwichow.

## AFRIKO

Mi laŭdas vin pro la gravaj kaj senĉesaj laboroj kiujn la institucio LBV realigas ekde ĝia apero. Via saĝo meritas benon, por ke LBV daŭru, kaj ke ĝi estu pli fruktdona pli ol la pasintjaroj. Mi redankas vin, ĉar viaj celoj valorigas nian internacian lingvon e-on, vere dank' al Esperanto ke mi nun konas la ekziston de LBV, ilia agado taŭgas. Kunlaborante kune kun vi, ni vere sciigos pri LBV al aliaj por la plej granda disvastigado de la altvalora lingvo Esperanto. Nome de geafrikanoj geesperantistoj, ni deziras al vi bonandatrevenon 2010 de LBV. Miajn sincerajn.

***(Athanase Namutema-Wabasobe, Burundo)***

**(Angolo)** Miguel Faria de Bastos – **(Benino)** François Hounsounou, Innocent Eteka – **(Burundo)** Kagina Lucien, Jérémie Sabiyumva – **(Ebur-Bordo)** Antoine Kouablan Kouassi – **(Komoroj)** Ali Mze Mihidjahi – **(Kongo)** Eddy Sava Babiu, Emile Malanda Nianga, Jean Bosco Malanda, Jean Paul Alexis, Kizeyidioko

# LBV partoprenas de la 94a Universala Kongreso de Esperanto

*"Krei pacan ponton inter la popoloj: Zamenhof hodiaŭ".* Ĉi tiu penso kondukis ĉirkaŭ 2 milojn da esperantistoj el 63 landoj al diskutado pri la heredigo lasita de la pola kuracisto kaj lingvisto, nome la plej parolata planlingvo de la mondo dum la 94a Universala Kongreso de Esperanto. Okaze de la evento, Legio de Bona Volo aktive partoprenis kunlabore al la ĉefa temo, kiu celebris la 150-jariĝon de Zamenhof, kovrilpaĝa artikolo de BONA VOLO 65, tiuokaze aperinta.

La renkontiĝo, kiu okazis inter la tagoj 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto, en Bjalistoko, Pollando, pritraktis ankaŭ la progresojn, celojn kaj defiojn alfrontatajn de organizaĵoj, asocioj kaj movadoj, kiuj disvastigas la internacian lingvon pere de konferencoj, debatoj, teatraĵoj, koncertaĵoj, kunsido por aŭtografoj, ludaj kaj sportaj eventoj, ekskursoj kaj aliaj turismaj aktivecoj, ekzamenoj pri diversnivelaj lingvo-kono, DVD- KD- rev- ĵurnal- libr- ekspozicioj, inter aliaj.

LBV, grava apoganto de Esperanto portis al la partoprenantoj sian mesaĝon pri Kulturo de Paco kaj solidareco inter la nacioj per publikigaĵoj, ekzemple de revuoj, faldfolioj, kiu prezentas artikolojn de la verkisto Paiva Netto.



Paulo César Pereira

1



Paulo César Pereira

2



Ana Paula de Oliveira

3

**(1)** Junaj brazilanoj ĉeestantaj en la 94a Universala Kongreso de Esperanto, en la urbo Bjalistoko, en Pollando. Meze **Ana Paula de Oliveira**, el LBV.
**(2)** Reprezentanto de LBV disdonas faldfoliojn pri TBV en Bjalistoko.
**(3)** Sur la foto, la irana esperantistino **Farzane Hakim Ghods**; la vicprezidanto de la Nepala Esperanto-Asocio, s-ro **Poshraj Subedi**; prezidanto de la Nepala Esperanto-Asocio, s-rino **Indu Devi Thapaliya**; kaj **Paulo César Pereira**, el LBV.

Mayinda Arlain, Rachel Mafuluko Kahima, Roger Mambuene Mbunga – **(Niĝerio)** Bright Emeka – **(Senegalo)** Antoine Gomis – **(Togolando)** Gbeglo Koffi – **(Ugando)** Honoré Sebuhoro.

## EŬROPO

La agado de LBV kaj la nova instrumetodologio de la spirita frato Paiva Netto estas modelo por la tuta homaro. Miaj streboj estas la samaj. La agado kaj instruado de LBV estos bona modelo kaj fundamento por la Nova Socio! La Dio benu Vin kaj Viajn proksimulojn

***(August Kilk, Estonio)***

Nome de la Milana Esperanto-Klubo mi sendas niajn kortuŝitajn esprimojn pri via nobla kaj dankenda laboro favore de la aliaj, sub la insigno de la amo kaj de la solidareco. Gratulojn pro la datreveno [60-jariĝo de LBV] kaj sincerajn bondezirojn por la estonto.

Mi denove vizitis la TTTejon de LBV kaj mi konfesas ke ĉiufoje mi ricevas admiroplenan impreson. Ne nur ĉar la TTTejo estas tre bone aranĝita, belaspekta, interesa kaj riĉa pri la enhavoj. Tio kio pli mirigas min estas la legado pri la agadoj de LBV en la socia kampo por helpi la aliajn pliboniĝi. Precipe pri edukado. Tion kion oni faras estas vere admirinda kaj postulas ankaŭ kapablojn kaj engaĝiĝon.

***(Ermigi Rodari, Italio)***

Estimataj gesamideanoj, gvidantoj de LBV! Permesu al mi, ke mia nome kaj en la nomo de Esperanto-klubo de doktoro Schulhof kaj de la Asocio de Esperantistoj Handikapuloj en la ĉeĥa urbo Pardubice mi el la tuta koro bondeziru al Vi okaze de la 20-a fond-jubileo de Via belega Templo de Bona Volo.

Kiam mi vidis la unuan fojon tiun ĉarman konstruaĵon en la gazetoj, mi poste trovis Viajn webajn paĝojn [www.tbv.com], ke mi povu pli bone ĝui ankaŭ internojn, galeriojn, adorejon kaj pluajn partojn de tiel grandioza monumento.

Ni ĉiuj deziras, ke Vi havu senĉese tiom multe da admirantoj kaj vizitantoj kaj ke Via agado estu daŭre tiel granda kaj por multaj homoj utila. Vi instruas pri paco, toleremo kaj frateco, Vi helpas al ĉiuj, kiuj bezonas helpon.

## LBV estis temo de prelego en Beogrado, Serbio



La ĵurnalisto Dimitrije Janičić kaj s-ino Terezija Kapista en la Esperanto-Asocio Radomir Klajiĉ, en Serbio.

El Beogrado, la ĵurnalisto **Dimitrije Janičić** sendis al Portalo Bona Volo sciigon pri prelego, kies temo estis Legio de Bona Volo. Ĝi okazis en la Esperanto-Asocio Radomir Klajiĉ, en la ĉefurbo de Serbio.

Ĉi tiun prelegon donis s-ino **Terezija Kapista**, kiu ekde kelkaj jaroj vizitis la Templon de Bona Volo (TBV), en Braziljo, kaj ankaŭ lernejojn subtenatajn de LBV en diversaj lokoj de Brazilo. Ĉi-okaze s-ino Terezija tiom impresiĝis de la pedagogia altkavlito, kion havigis la Institucio al la gelernantoj, ke ŝi komencis disvastigi la idealojn de LBV tra la mondo, okaze de siaj internaciaj vojaĝoj kiel agemulo de la E-movado, dum kiam ŝi prelegas kaj instruas en pluraj landoj.

Okaze de la ĉi-rilata prelego pri LBV, ankaŭ s-ro Dimitrije havis oportunon legi eltiraĵojn el la revuo *BONA VOLO*, speciala eldon-numero 65, celebre al 150-a jubileo de E-kreinto L. L. Zamenhof.

Mi opinias, ke ni eŭropanoj bezonus multe lerni de Vi.

***(Jarmila Rýznarová, Ĉeĥa Respubliko)***

1 januaro 2010 signifas ankaŭ grandegan celebron de mirakla estaĵo de Legio de Bona Volo. Ĉi tiu granda verko, kiu liveras al Brazilo kaj la mondo ĉiuloke sur la Tero la inviton por la unuiĝo de ĉiuj homoj.

Ĉe la Legio de Bona Volo, mi persone sentas min hejme, mi tute apogas, apogos tiun agadon, espereble ke mia Spirito kaj Animo povu esti ĉiam kun vi, mian korbaton aŭdas la tuta mondo, parolante saman lingvon Esperante Ame.

Mi sentas min honore kunlabori kun vi, gratulante José de Paiva Netto por tiu ĉi mirakla aktiveco, sento, unuiĝo de la tuta homaro, kun intenco ŝanĝi la pensmanieron por pli bona mondo. Sanon, amon, kredon, esperon, prosperon, multajn sunradiojn, reagojn el parto de viaj sindonemaj kunlaborantoj, al kiu ankaŭ mi deziras aparteni, kun samaj ideoj, idealo.



Admirinda estas la ekzistado de Legio de Bona Volo, organizo, kiu edukas kun ekumena spiritualeco (...).

Mi deziras Bonan Novan Jaron, Bonvole por Bona Volo, por José Paiva Netto, modelo de la tuta mondo, por lia tuta entuziasma, agema kolegaro, en Universala Amo! Legio de Bona Volo vivu eterne je servo de la Homaro! Akceptu mian tutan admiron, elkore.

***(Jolanda Józsi, Rumanio)***

Ege min ĝojigas (...) agado Bona Volo, por la pli bona kaj pli feliĉa vivo en via urbo, en via lando kaj en la tuta mondo. Floru kaj kresku via prospera agado!!!

***(Jozefo Marević, Hungario)***

Je la nomo de Esperantista societo "Kolombo de la paco" u. Galabovo, Bulgario mi plej kore salutas ĉiujn kaj mi bondeziras sukcesan solenaĵon [de Templo de Bona Volo]. Uzante Esperanton daŭrigu vian malfacilan, noblan mision por la fratigo de la popoloj. Tio estas granda kontribuo por konservi la pacon sur la Tero – nia komuna patrino.

***(Kanjo Mitev Kanev, Bulgario)***

Hola! (...) Mi jam aŭdis paroli pri LBV. Mi povis vidi viajn fotojn, kiuj estas belegaj. Ĉiu sistemo por

## Kvina Spirita Gvidantino de Oomoto de Japanio vizitas Ekumenan Templon de LBV

Fotoj: Vivian Ribeiro Fereira





**1)** Maldekstre dekstren: **Felipe Duarte**, de LBV, la Kvina Spirita Gvidantino de Oomoto, **Kurenai Deguĉi**, profesoro **Ŝigeki Maeda**, membroj de Brazila Esperanto-Ligo, **Paulo Medeiros** kaj kelkaj infanoj asistataj de LBV, en la Nobla Salono de Templo de Bona Volo. **2)** Paulo Medeiros, de LBV, la Spirita Gvidantino Kurenai Deguĉi kaj profesoro Ŝigeki Maeda, de Oomoto Internacia, apud la sanktaj vestoj de la japankulturo, donacoj de ili al Paiva Netto, elmontrataj en memorigejo dediĉata al prezidanto de LBV, en la Templo de Bona Volo.

Dum vizito al Brazilo, okaze de japana festivalo de Oomoto Internacia, la Kvina Spirita Gvidantino de Oomoto, Kurenai Deguĉi, vizitis la Templon de Bona Volo (TBV).

Sinjorino Kurenai Deguĉi estis akceptata de la reprezentanto de la Templo de Paco, Paulo Medeiros, kaj de la Soldatetoj de Dio, de LBV, — kiel ameme estas nomataj la infanoj de la Institucio —, kiuj donacis al ŝi bukedon da rozoj kaj salutkarton en Esperanto, kune kun la publikigaĵoj *Paco por la Jarmilo, Tutmondigo de la Frata Amo, Solidara Socio*, faldfolio de TBV japanlingve; kaj la eldonnumero 65 de la revuo *BONA VOLO*.

Akompanis sinjorinon Deguĉi la direktoro de Oomoto Internacia, sinjoro Ŝigeki Maeda, granda amiko de LBV, kiu, dum la tuta tempo de la vizito, interpretis al la japana ĉion, kion la reprezentantoj de LBV klarigis pri ĉiu loko.

Tuj kiam ŝi alvenis la Sanktan Fonton de Templo de Paco, la Spirita Kvina Gvidantino de Oomoto montris ĝojon ekscii, ke d-ro **Masaru Emoto** jam vizitis la Ekumenan Ensemblon de LBV (konsistanta el TBV kaj ParlaMundi de LBV), kie li prelegis pri la graveco de akvo.

Okaze de la vizito, nun en Memorigejo José de Paiva Netto, sinjorino Deguĉi elstarigis, ke ŝi sin sentis honorigata vidi la donacojn, kiujn ŝi dediĉis al la direktoro-prezidanto de LBV kaj fondinto de la Templo de Bona Volo, en la jaro 2007.

---

plibonigi la vivon de la homaro estas laŭdinda kaj apoginda.

Fakte, mi diskonigos vian taskon inter miaj konatuloj, ĉu esperantistoj aŭ ne.

***(Luis Serrano Pérez, Hispanio)***

Ĵus revenante el Bialystoko, mi legis vian interesan revuon [BONA VOLO]. Mi ŝatus gratuli LBV-on pro tia bela revuo (luksan!) kaj ankaŭ pro la artikolo pri Belgio (nia revuo: "Esperanto en Marche") Elkoran dankon.

***(Marcel Delforge, Belgio)***

Mi iomete konas LBV jam de ĉirkaŭ 20 jaroj, kaj daŭxre havas pozitivan opinion pri ĝi. Via retejo en Esperanto (kaj ankaŭ tiu en germana lingvo) estas sufiĉe alloga. Via bonfara kaj filantropia agado estas tre laŭdinda.

***(Ulrich Matthias, Germanio)***

**(Aŭstrio)** Gregor Hinkler, Klaus Perko – **(Belgio)** Cyrille Bande, Johan Van Eenoo, Marc Cuffez, Roland Rotsaert – **(Bosnio-Hercegovino)** Mićo Vrhovac – **(Britio)** Hussain Mohammed Al-Amily – **(Bulgario)** Bojidar Leonov – **(Estonio)** Ede-Mall Puskar – **(Finnlando)** Arvo Karvinen, Raita Pyhälä – **(Francio)** Chantal Bécheret, Da-

# ParlaMundi de LBV gastigis eventon de Oomoto Internacia

Vivian Ribeiro Fereira



La Kvina Spirita Gvidantino de Oomoto ĉe oomotanoj, kiuj prezentiĝis dum solenaĵaroj de Utafesto, surpodie de la Kunsidejo José de Paiva Netto, de ParlaMundi de LBV.

La 13-an de oktobro 2010 Oomoto Internacia okazigis grandan japanan festivalon, la *Utafesto*, bazita sur religiaj kaj kulturaj tradicioj, en la Monda Parlamento de la Ekumena Frateco, la ParlaMundi de Legio de Bona Volo (LBV).

Per intervjuo al la Departemento pri Esperanto de LBV, profesoro Ŝigeki Maeda, direktoro de la organizaĵo, klarigas pri la historio kaj signifo de la evento: *"Utafesto estas sankta evento por priĵuri Dion per utao aŭ tankao, t.e. japana poemo, kiun prapatroj de la japana popolo plenumadis jam de antikva tempo. Kaj ĝi estas ankaŭ popola festivalo, inkluzivanta la japanajn tradiciajn spektaklojn nome, dancon, kanton, prezentojn de militaj artoj, ceremoniojn, ekspoziciojn pri historio de Oomoto k.t.p. En la antikva tempo, Utafesto okazis en ĉiuj vilaĝoj, por forigi malbonajn elementojn en la vilaĝana koro, akumulitajn pro la malamo aŭ malpaciĝo, kaj por promesi belajn agojn en la venonta jaro. Per Utafesto la japana popolo preĝas al Dio por monda paco kaj por la feliĉo de la homaro kaj de ĉiu familio".*

En 2010 la evento okazis en du urboj: Braziljo kaj San-Paŭlo kun la nobla ĉeesto de la Kvina Spirita Gvidantino de Oomoto, sinjorino Kurenai Deguĉi, idino de la fondintoj de la institucio. En la brazila ĉefurbo, la organizaĵo elektis la Kunsidejon José de Paiva Netto, de ParlaMundi de LBV, por gastigi la festivalon: *"Ĉar Utafesto estas sankta afero, la plej taŭga loko por ĝia efektivigo estas iu sankta loko"*, asertis profesoro Maeda.

niel Durand, Eugène de Zilah, Jean Ripoche, Pierre Grollemund, Roger Degrelle – **(Germanio)** Bernhard Maurer, Peter Kühnel, Stani Ryndu-ch – **(Hispanio)** Lorenzo Noguero – **(Hungario)** Árpád Máthé , Adrienne Pásztor, Imre Ferenczy – **(Irlando)** Joy Davies – **(Italio)** Cesco Reale, Gianfranco Polerani, Gianni Conti, Nicola Morandi, Renato Corsetti, Tommaso Manzon – **(Kroatio)** Boris Di Costanzo, Radenko Miloŝeviĉ – **(Litovio)** Aldona Grikietiené – **(Nederlando)** Douwe Beerda, Johan Derks – **(Pollando)** Andreo Pettyn, Andrzej Grzębowski, Elżbieta Frenszkowska, Roman Dobrzyński, Tadeusz Kopeć – **(Portugalio)** João José Santos – **(Slovakio)** Magdaléna Feifičová – **(Svedio)** Bengt Olof Åradsson, Arne Lundkvist – **(Svislando)** Claude Gacond, Miveille Grosjean.

## AZIO

Tre karaj samideanoj de Brazilo,

Mi kore dankas vin por via informo pri Bonavolo. Mi ĝuante legis ĝin. Mi gratulas vin por via sukceso.

Fakte, tiu ĉi laboro estas ege interesa kaj malfacila. Mi esperas, ke vi sukcesos en via celo. Mi konsentas vin, ke egaleco, samajrajtoj, homajrajtoj inter viro kaj virino devas daŭriĝi por ĉiam. Virinoj ludas grandan kaj gravan rolon ne nur en sia familio, antaŭ por la monda paco.

(...) Laŭ mia opinio, se virino ridas, ne nur ŝi, ankaŭ tuta mondo ridas kaj se virino ploras, ne nur ŝi, ankaŭ tuta mondo ploras.

Bv daŭrigi vian rimarkindan laboron. Mi sendas varman saluton el naskiĝloko de Budho kaj lando de Mt. Everesto, Nepalo. Kun sincerajn salutojn, plej amike.

***(Mukunda Pathik, Nepalo)***

Okaze de la solena malfermo, la reprezentanto de Templo de Bona Volo, Paulo Medeiros, parolis ĉe aliaj reprezentantoj. Li bonvenigis la vizitantojn kaj elstarigis la penson de la direktoro-prezidanto de LBV, José de Paiva Netto: *"En tiu Parlamento, malharmonio, radikalismoj, ĉiuspecaj malamikecoj devas resti for de la debatoj kaj de proponoj religiaj, filozofiaj, politikaj, sciencaj, ekonomiaj, artaj, sportaj, kaj de io ajn pli, ĉar la Homo naskiĝas sur la Tero por kunvivi en socio, en Solidara, Altruisma, Ekumena Socio"*. La partoprenantoj de Japanio sekvis la parolon en la gepatra lingvo.


Paulo César Pereira

De maldekstre: Jéssica Botelho, de LBV; profesoro Amri Wandel, esperantisto kaj izraela sciencisto; sinjoro Elianildo Nascimento, reprezentanto de URI; Paulo Medeiros kaj Felipe Duarte, de LBV.

Sekve sinjoro **Elianildo Nascimento**, reprezentanto de la organizaĵo URI (angle, Iniciato de Unuiĝintaj Religioj) de Braziljo, kondukis la preĝon de la religiuloj kaj invitis ĉiujn stariĝi kaj momente silenti.

Ankaŭ ĉeestis en la evento la esperantista, izraela sciencisto kaj profesoro **Amri Wandel**.

Enkadre de la programoj, okazis vespermanĝo, kiu Oomoto aranĝis al siaj invitatoj. Invitita de la organizantoj, Legio de Bona Volo partoprenis la ĉefan tablon. Ĉiokaze sinjorino Deguĉi salutis la ĉeestantaron kaj dankis ilin pro la partopreno de ĉiuj en la evento, samkiel profesoro Ŝigeki Maeda, kiu nepre volis paroli (internacilingve), kun samtempa traduko al la portugala fare de la reprezentanto de Brazila Esperanto-Ligo (BEL), sinjoro **José Carlos Dorini**, oratoro de la evento.

Okaze de la semajno de Utafesto, venis al ParlaMundi de LBV proksimume 60 oomotanoj el Japanio, 11 ambasadoroj kaj diversaj religiaj reprezentantoj. Sume partoprenis 500 homoj, inter ili, profesoroj, esperantistoj, entreprenanistoj, sciencistoj, filozofoj, simpatianoj de Esperanto kaj aŭtoritatuloj de la tuta Brazilo.

Sekvante la japanan komitaton, iu loka TV registris la ĉefajn okazaĵojn de la evento kaj ĉiokaze intervjuis Paulo Medeiros, kun sinsekva traduko al la anglalingvo.

Portalo Bona Volo estas ege interesa kaj utila informado por la tuta Homaro. (...) Via sincere.

***(Saeed Ahmad Farani, Paskitano)***

**(Ĉinio)** Cao Baozhu, Chielismo WANG Tianyi, Han Zuwu, Xiao Peiliang, Wu Guojiang, Welism Di – **(Hindio)** Aniruddha Banhatti, Ranganayakulu P.V. – **(Japanio)** Hiroshi Nagata, Hori Yasuo – **(Nepalo)** Indu Devi Thapaliya – **(Pakistano)** Jawaid Eahsan – **(Rusio)** Anatolo, Sergej Paĥomov – **(Sri-Lanko)** Zeiter Perera – **(Taĝikistano)** Saidnabi Saidihomzoda – **(Vjetnamio)** Nguyen Phuong Mai.

## MEZORIENTO

**(Irano)** Simin Emrani – **(Israelo)** Esther Sebban, Shlomo Lerman – **(Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj)** Bhasker G.

## OCEANIO

Templo de Bona Volo estas loko de paco, amo, meditado kaj kunestado por la tuta homaro. Bedaŭrinde ne ĉiuj havos la eblecon viziti ĝin persone, nek rigardi la retejon, sed estas tre konsolema la fakto ke Templo de Bona Volo ekzistas sur la tero. Mi certas ke miloj da homoj dum ĉi tiu monato aparte koncentriĝos pri ĝiaj spiritaj donacoj kaj pro tio ili sentos sin pli trankvile, bonsane, pace kaj kompreneme kaj tolereme rilate ĉiujn homajn popolojn kaj ĉiujn bestojn. (...) Mi persone esperas ke Templo de Bona Volo restos kaj estos daŭre prizorgata por ke la homaro povu ĉiam profiti de ties spirita nutrado.

***(Jennifer Bishop, Aŭstralio)***

**(Aŭstralio)** Bob Felby, Donald Broadribb, Kay Andersen, Penelope Vos.

**Sendu ankaŭ Vi retpoŝton al LBV**

**esperanto@bonavolo.com**

# LBV kaj Esperanto



**USONO**
**Komunikilo:** Interreto
**Diskoniganto:** Neil Blonstein

S-ro Neil Blonstein estas reprezentanto de Universala Esperanto-Asocio (UEA), en la usona sidejo de Unuiĝintaj Nacioj, kaj, malgraŭ tio ke li prizorgas neniun informilon, li helpis al la plivastigo de la idealo de Bona Volo en sia lando per sendo de retmesaĝo-invito al grupo de esperantistoj por ke ili vizitu la plej novan oficejon de LBV en Manhatano, inaŭguritan en julio 2010.



**BRAZILO**
**Komunikilo:** Novaĵletero
**Nomo:** BEL Informas
**Diskoniganto:** Paulo Sérgio Viana

La reta novaĵletero de Brazila Esperanto-Ligo, *BEL Informas*, aperigis artikoleton pri la revuo *BONA VOLO Virino*, publikigaĵo de LBV kvarlingve portita al UN en 2010. Ĉi-okaze la diskoniganto estis la iama vicprezidanto de BEL, d-ro Paulo Sérgio Viana, kiu skribis: "Revuo de LBV omaĝas virinojn". Legu elprenaĵon: *"Freŝdate la esperanta fako de LBV pluan fojon surprizis la esperantistaron per aperigo de plia luksa kaj riĉenhava eldono de sia revuo BONA VOLO, kiu ĉi-numere prezentas specialan omaĝon al la virinoj. 16 distingidaj virinoj, inter kiuj Eleanor Roosevelt, Gabriela Mistral, Bibi Ferreira, Maria Quitéria kaj Cecília Meireles, estis elektitaj de la omaĝanto, la ĵurnalisto José de Paiva Netto, por prezenti ĉiujn virinojn – ĉu anonimajn, ĉu tiujn kiuj elstare partoprenas en la gravaj decidoj de la socio".*

# kunplektas la manojn



**BRAZILO**

**Komunikilo:** Revuo

**Nomo:** La Lampiro

**Diskoniganto:** Joseo Tenorjo

La n-ro 124 de la revuo *La Lampiro*, oficiala organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (EASP) publikigis artikolon pri la lanĉo de la revuo *BONA VOLO* n-ro 65, per la titolo "LBV omaĝas la kreinton de Esperanto": *"(...) Gratulinda estas la laboro de la eldona fako de Legio de Bona Volo, kiu pluan fojon surprizas la esperantistaron per alloga publikigaĵo kun riĉa enhavo bunte ilustrita. Plej gratulinda tamen estas la decido de la gvidanto de la Institucio, la ĵurnalisto kaj verkisto Paiva Netto, kiu ne ŝparis rimedojn por havigi al la esperantista komunumo tiel bonkvalitan revuon. La revuo prezentas la specialan artikolon 'Zamenhofa Jaro – Esperanto kiel paca ponto', per kiu la insitucio omaĝas la 150-jariĝon de la naskiĝo de la iniciatinto de Esperanto, Dr. L.L. Zamenhof, nome de ĉiuj esperantistoj ideale laborantaj cele progresigi la tutmondan heredaĵon postlasitan de tiu homarana pacamanto. (...) Per revuo Bona Volo, ĝia eldona stabo celas prezenti spiritualecon el ekumenisma vidpunkto surbaze de aktualaj okazaĵoj, kiuj minacas la trankvilon de nia moderna mondo, postulante de ni pli solidaran intervenon en la sociaj kaj mondaj problemoj"*.



**KANADO**

**Komunikilo:** Bulteno

**Nomo:** Hilelisto

**Diskoniganto:** Raymond Brisebois

La Departemento pri Esperanto de LBV ricevis la eldonon de decembro 2009 de la esperanta bulteno *Hilelisto*. En la rubriko *"Komentoj de la Redaktoro"*, la kanada publikigaĵo aperigas tekston pri la pionira laboro de la brazila Institucio aludantan al la Templo de Bona Volo kaj al la Monda Parlamento de la Ekumena Frateco, la ParlaMundi de LBV. La artikolon verkis Raymond Brisebois: *"En Brazilo fondiĝis en 1950 la Legio de Bona Volo. (...) Ĝia ĉefcelo estas religi-spiritualista, faranta vastan karit-rilatan laboron je infanoj ĝis maljunuloj kaj ankaŭ je malriĉuloj. Partoprenante la ekumenisman movadon, ĝi finkonstruis la Templon de Bona Volo en la ĉefurbo Brasília en 1989. Ankoraŭ estante la plej populara loko por vizitantoj kaj pilgrimoj en tiu urbo, ĝi kune servas kiel inspiroloko kune kun ParlaMundi, kiu gastigas forumojn kaj kunvenojn de tiuj dezirantaj ekumenan civitanaron kaj la valorigon de la homaro kaj de ties eterna spirito. LBV havas aktivan departementon de Esperanto kaj konstante eldonas nialingve kaj partoprenas plene en la movado sialande kaj mondvaste"*.



**ARGENTINO**

**Komunikilo:** Interreto

**Nomo:** retkompaso.com.ar

**Diskoniganto:** Rubén Diaconu Tkachenco

Per la lanĉo de la revuo *BONA VOLO* n-ro 65, okaze de la 94a Universala Kongreso de Esperanto, homoj el pluraj landoj manifestis sian kontenton post lego de la materialo de LBV. Tiel okazis al la argentinano kaj UEA-delegito, Rubén Diaconu. Li diris ke al li plaĉis la publikigaĵo kaj tial li diskonigis ĝin en la retejo de Argentina Esperanto-Ligo, akompane de jena teksto: *"Legu en ĉi tiu eldonnumero 65 de la revuo BONA VOLO la artikolon de la ĵurnalisto Paiva Netto titolitan 'Ne timu la krizon. Ĝi forpasos, vi restos.', gravan mesaĝon pri kiel ni povas uzi la krizan periodon por atingi ekvilibron! Legu ankaŭ specialan artikolon verkitan de la skipo de BONA VOLO pri la Zamenhofa Jaro, dum kiam la E-komunumo festas la 150-an naskiĝdatrevenon de la kreinto de Esperanto. Kaj pli multe da aferoj!"*.



**GERMANIO**

**Komunikilo:** Interreto

**Nomo:** fen-net.de

**Diskoniganto:** Bernhard Maurer

De ses jardekoj Esperanto kalkulas je la apogo de Legio de Bona Volo, kiu pere de la internacia lingvo venigas al la mondo bonkvalitan informon pri temoj sociaj, kulturaj, edukaj kaj sanrilataj, pritraktataj ĉiam laŭ vidpunkto de Ekumena Spiritualeco, kiujn portas la beletraj verkoj de la brazila Institucio. Tiu laboro montriĝas laŭ plej diversaj formoj kaj eĥadas tra la tuta mondo. Kiu ankaŭ kunlaboras kun tiu frata diskonigado estas s-ro Bernhard Maurer, kiu metis ligilon al Portalo Bona Volo en la retejo de la spiritisma movado en Germanio.



**DANIO**

**Komunikilo:** Revuo

**Nomo:** Esperanto en Danio

**Diskoniganto:** Ileana Schrøder

La revuo *Esperanto en Danio*, oficiala organo de Dana Esperanto-Asocio, aperigis en sia eldono de junio 2009 artikoleton pri la agadoj de Legio de Bona Volo. La diverstema revuo emfaze pritraktas la kulturajn kaj artajn demandojn de la esperantista movado, ne nur en Danio, sed en la tuta mondo. La redaktistino kaj prezidanto de Dana Esperanto-Asocio, Ileana Schrøder, ĉiam ricevis tre afable la mesaĝon de LBV. La brazila Institucio estis reliefigata en la publikigaĵo pro tio ke ĝi reprezentas Latinamerikon en la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de Unuiĝintaj Nacioj (Ekosok).



**ITALIO**

**Komunikilo:** Bulteno

**Nomo:** Informilano

**Diskoniganto:** Ermigi Rodari

Retuzanto de Portalo Bona Volo, s-ro Ermigi Rodari, sekretario de la Milana Esperanto-Klubo, omaĝe al la 60-jariĝo de LBV, publikigis artikolon en la oficiala organo de tiu Klubo, *Informilano*, per kiu li reliefigas tuj sur la titolo la markon de la Institucio: "La koro kiu pulsas por la Homaro de 60 jaroj". La informilo raportas pri la agadoj de LBV ĉe la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj, kun kies Ekonomia kaj Socia Konsilantaro (Ekosok) ĝi tenas ĝeneralajn konsultajn rilatojn ekde 1999; pri la laboro de la brazila Organizaĵo realigata ankaŭ en Argentino, Bolivio, Usono, Paragvajo, Portugalio kaj Urugvajo, krom tio ke ĝi konkeras simpatiantojn en la tuta mondo per la internacia lingvo.



**SERBIO**

**Komunikilo:** Konkursaĵo

**Nomo:** Esperanto-Centro de Torino

**Diskoniganto:** Terezija Kapista

En sia dua jareldono, la Literatura konkurso Renato Pennazio, realigata de la Esperanto-Centro de Torino, premiis la serban esperantistinon Terezija Kapista, kiu sukcesis la unuan lokon en la konkurso. Per sia konkursaĵo "Kiom vojaĝo influis en mia vivo" s-ino Kapista raportas pri okazintaĵoj en sia vivo, kiujn ŝi konsideras plej gravaj, post eklerno de Esperanto - lingvo instruata de ŝi en kvindek landoj, kiujn ŝi vizitis. Raporte, s-ino Kapista reliefigis ke, okaze de siaj poresperantaj vojaĝoj, ŝi persone konatiĝis kun LBV. La zorgo pri la proksimulo, la signifo pri Homareco kaj Ekumena Spiritualeco de LBV kortuŝis ŝin kaj ŝi ne povis ne registri siajn impresojn pri la Institucio en sia premiita verko: *"Legio de Bona Volo estas la plej granda organizaĵo kiu helpas al homoj diversmaniere kun aparta organiza formo kiel: infanĝardenoj, lernejoj, mezlernejoj, maljunulejoj, multflanka agado kun perfektaj kunlaborantoj. Kaj disdonadas helpojn al bezonantoj kaj eldonadas librojn ankaŭ en Esperanto. Iliaj preĝejoj estas ege modernaj kaj belegaj"*.



**BELGIO**
**Komunikilo:** Interreto
**Nomo:** Movado sen Nomo
**Diskoniganto:** Lode Van de Velde

Portalo Bona Volo plivastigas la fratan mesaĝon de Legio de Bona Volo al la kvar anguloj de la terglobo pere de sep lingvoj, inkluzive per Esperanto. Multaj personoj kunlaboras por tiu plivastigo per plej diversaj manieroj, kiel la belga esperantisto Lode Van de Velde, kiu metis ligilon al la Portalo Bona Volo en la retejo zorgata de li, *Movado sen Nomo* (www.movado-sen-nomo.org), en la menuero "Ligoj". Tiamaniere s-ro Lode Van de Velde invitas siajn retamikojn koni plibone LBV-on kaj ties tutan agadkampon en Brazilo kaj en la mondo, plifortigante la amikajn rilatojn kun la brazila Organizaĵo.



**BENINO**
**Komunikilo:** Interreto
**Nomo:** Ipernitio
**Diskoniganto:** François Hounsounou

La esperantisto François Hounsounou cedis spacon en sia blogo (www.ipernity.com/blog/42310) por la ekumena mesaĝo travivata de LBV ĉiutage per siaj soci-edukaj programoj. Ĉi-foje evidentiĝis la artikolo de la prezidanto de LBV, José de Paiva Netto, nomata "Nova Jaro! Bona Jaro?". Per ĝi, la ĵurnalisto Paiva Netto diras: *"Bona Jaro? Dependas de ni mem! Kaj de la kompreno ke — sen la konscienco, ke la Spirita Vivo estas realaĵo — la materia vivo povus fariĝi malordo, se ni fakte ne scias ĝuste uzi la liberan elektopovon, ĉefe ĉe Demokratio, kiu estas la reĝimo pri respondeco".*



**ALBANIO**
**Komunikilo:** Bulteno
**Nomo:** Bulteno de la Albana Esperanto-Instituto
**Diskoniganto:** Bardhyl Selimi
La monata organo de Albana Esperanto-Instituto, per sia eldono n-ro 90/aŭgusto/2010, aperigis tri tekstojn dediĉitajn al Legio de Bona Volo. La diskoniganto estis la profesoro pri matematiko kaj sekretario de Albana E-Instituto, s-ro Bardhyl Selimi, el Tirano, ĉefurbo de Albanio. Unu el la tekstoj publikigitaj en tiu bulteno resume raportas pri la historio de LBV, elstarigante ties enlandajn kaj alilandajn agadojn. Alia teksto publikigita estis prenita el la Portalo Bona Volo, nomata "Uzu pli da tempo hejme por ludi kun viaj gefiloj", per kiu oni atentigas pri la graveco dediĉi pli da tempo ĉe la familio, spite de troa laboro kaj premo de la ĉiutago. En la fino, la informilo invitas siajn legantojn koni la laboron realigatan de la Agema Ekumena Junularo de LBV.

**HUNGARIO**
**Komunikilo:** Revuo
**Nomo:** Internacia Fervojista Esperanto-Federacio
**Diskoniganto:** István Gulyás
Per mesaĝo sendita al Portalo Bona Volo, s-ro István Gulyás, vicprezidanto de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio kaj prezidanto de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio, rakontas ke li konis la Institucion en 2002 okaze de la 87a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Fortalezo, Brazilo: *"Ekde tiam mi konstante legas la revuon BONA VOLO, kaj mi multe taksas la agadon de tiu organizo sur la tereno de paco kaj de neprofitema helpado. (...) Pro tiu agado favore al la homaro, LBV estas amata kaj respektata de la homoj kie ajn ili estas"*. Krom konstanta leganto de la revuo, s-ro István estas unu plia diskoniganto de nia mesaĝo: *"Kompreneble mi propagandas tiun ne nur en Hungario, sed en la kadro de la fervojistaj esperantistoj en la tuta Europo, eĉ en Ĉinio kaj Japanio"*.

**VJETNAMIO**
**Komunikilo:** Interreto
**Nomo:** Verda Mesaĝo
**Diskoniganto:** NGUYEN Phurong Mai
Omaĝe al la 60-jariĝo de LBV, pro ĝia servado al la popolo, plia grava esperanta komunikilo prestiĝigis la Institucion. Temas pri la retejo *Verda Mesaĝo* (www.e.vea.vn), en Vjetnamio, sur kies ĉefa paĝo la retuzantoj trovas ligilon al la Portalo Bona Volo, per kiu ili povas koni la soci-edukajn kaj ekumenajn laborojn de la brazila Institucio.



**AŬSTRALIO**
**Komunikilo:** Bulteno
**Nomo:** Tamen Plu
**Diskoniganto:** Robert Felby
Per sia eldono de decembro 2009, la aŭstralia bulteno *Tamen Plu* diskonigis artikolon pri la 20-jariĝo de Templo de Bona Volo, situanta en la brazila ĉefurbo. Legu elprenon el la artikolo "La Piramido de la Bona Volo" verkita de s-ro Robert Felby: *"Kiel vi ĉiuj devus scii, la Piramido de la Bona Volo [Templo de Bona Volo] datrevenis en oktobro. [Legio de] Bona Volo estas io, kion ni ĉiuj devus provi ĉiutage imiti. (...) Okaze de la datreveno, tre grandan feston kaj la tuta afero estis eĉ tre grandega evento. Miloj da homoj ĉeestis kaj partoprenis en la festo preĝante kaj kantante. Gvidis la grandan feston la mirinda s-ro Paiva Netto. Decas aldoni, ĉu ne, ke la Piramido estas ankaŭ Esperantujo, ĉar ĉiam vizitas ĝin multaj esperantistoj. Ĉu mi rajtas rekomendi al vi ĉiuj, tuj kiam vi havos ŝancon, iri viziti Braziljon kaj tiun jam mondfaman Piramidon!"*.



**JAPANIO**
**Komunikilo:** Interreto
**Nomo:** Esperanto-Societo en Numazu
**Diskoniganto:** HUZIMAKI Ken'iti
La japana retejo *Esperanto-Societo en Numazu* (www2.tokai.or.jp/esperanto), kiu jam publikigis artikolon pri Legio de Bona Volo, aldonis ligilon al Portalo Bona Volo en sia retejo, tiel invitante siajn retuzantojn koni iom pli la sociedukan laboron realigatan de LBV ĉe enlandaj kaj alilandaj familioj.

**Komunikilo:** Revuo
**Nomo:** La Orienta Revuo
**Diskoniganto:** Hori Yasuo
En januaro 2010, pro sia vasta agadkampo por plenumi la Jarmilajn Evoluigajn Celojn, de UN, Legio de Bona Volo pluan fojon ricevis atenton en la azia esperantista medio. La publikigaĵo *La Orienta Revuo*, ĝuanta grandan popularecon en Japanio, aperigis artikolon pri LBV omaĝe al ĝia 60-jariĝo dulingve: esperante kaj japane.



**ESTONIO**
**Komunikilo:** Interreto
**Nomo:** Spiritism.ee
**Diskoniganto:** August Kilk
*"Estas mirinda la Templo [de Bona Volo], multe pli mirinda estas LBV, fronte kun la estimplena ĉefrespondeculo Paiva Netto, pro la diece atingitaj fizikaj kaj spiritaj valoroj en la amo-konscio, por la spirita edukado tutmonde – cele al nova Socio Harmonia! La Dio benu Vin!"*. Tiel sin esprimis la esperantisto August Kilk okaze de la 20-jariĝo de la TBV, okazinta en oktobro 2009. Cele plifirmigi la amikrilatojn inter li kaj la Institucio, s-ro August disponigis du ligilojn al Portalo Bona Volo en la retejo de la spiritisma movado en Estonio (www.spiritism.ee), kiun li mastrumas: unu al la esperanta versio de la Portalo kaj alia al ties angla versio.



**AŬSTRALIO kaj NOV-ZELANDO**
**Komunikilo:** Revuo
**Nomo:** Esperanto sub la Suda Kruco
**Diskoniganto:** Ŝandor Monostori
La 103-a numero de la revuo *Esperanto sub la Suda Kruco*, oficiala organo de esperantaj asocioj de Aŭstralio kaj de Nov-Zelando, publikigis artikolon kiu reliefigas la sociedukan agadon de LBV. La esperantista kuracisto Ŝandor Monostori, retuzanto de la Portalo Bona Volo, iniciatis la publikigon de la teksto "La koro kiu pulsas por la Homaro de 60 jaroj", per kio li omaĝas la 60-jariĝon de LBV, memorfestitan la 1an de januaro 2010. La bulteno reliefigas la agadojn de Legio de Bona Volo rilate Edukadon kun atento al la Pedagogio de Bona Volo (kiu inkluzivas la Pedagogion de Amo kaj la Pedagogion de la Ekumena Civitano), eduka gvidlinio de la edukanto Paiva Netto, aplikata en ĉiuj soci-edukaj centroj de la Institucio, kiuj helpas al infanoj kaj gejunuloj travivantaj socian vundeblecon, havigante al ili bonan nutradon kaj bonajn zorgojn ĉiutage.

**La Departemento pri Esperanto de Legio de Bona Volo kore dankas ĉiujn samideanojn pro la diskonigado de la ekumenaj idealojn de frata amo, kiujn la Institucio predikas kaj praktikas por ke miloj da homoj povu konstrui plibonan mondon kie ajn ili estas.**

**Helpu ankaŭ Vi al tio ke LBV plivastigu sian mesaĝon pri Paco kaj Senlima Ekumenismo al ĉiuj anguloj de la terglobo. Se vi laboras ĉe aŭ respondecas pri iu komunikilo, kontaktu nin per esperanto@bonavolo.com kaj diskonigu tiun ĉi iniciaton al ĉiuj viaj amikoj, retuzantoj, legantoj kaj samideanoj. Partoprenu en tiu ĉi granda blua koro pulsanta por la Homaro jam de 61 jaroj!**



# Perforta ludado

## Laŭ esploristoj, videoludiloj kaj filmoj stimulas agresan konduton

Mariana Malaman



Arkivo BV

Mariana Malaman, diplomiĝinta pri Ĵurnalismo ĉe Rutgers (Nov-Ĵerzejo/ Usono).

En Usono, perforto ĉe gejunuloj kaj infanoj, inkluzive en lerneja medio, iĝas konstanta motivo por maltrankvilo. Pluraj studoj provas kompreni la kialon de ĉikanado (angle, *bullying**) fare de malicularoj, pro incidentoj, kiel tiu okazinta en la Politeknika Instituto de Universitato de Virginio la 16an de aprilo 2007, en kiu la 23-jara studento **Cho Seung-Hui** mortigis 33 personojn, inkluzive lin mem. Unuvorte, la veraj motivoj, kiuj kondukas la junularon al tiom da perfortoj estas io kio devas esti serioze konsiderata. Iuj esploristoj rimarkigas, ke unu el la estigantoj de tiaj damaĝoj estas perforto en

* *Bullying* — En la studoj pri la problemo de lerneja perforto, tiu ĉi termino, veninta el la anglosaksa psikologia literaturo, difinas tutaĵon da kondutoj agresemaj, kontraŭsociaj, intencaj kaj ripetantaj, uzataj de unu aŭ pli da lernantoj kontraŭ alia(j), havigante al (i)li ĉagrenon, doloron kaj suferon.

amaskomunikiloj.

Amasinformiloj multfoje diskonigas dubindajn mondperceptojn, valorojn kaj bildojn. Esploro fare de *Gallup Youth Survey* (GYS) informas, ke en Usono infano inter 2-jara kaj 11-jara spektas televidon po mezume 3 horoj kaj 16 minutoj tage. Per tiu sama enketo, gejunuloj diris, ke ili vidas TV-on *"kiom multe ili volas"*. Laŭ Nacia Asocio por Edukado de Infanoj, en Usono, 90% el tio kion infanoj spektas en televido estas *"programoj por plenaĝuloj"*.

La Usona Akademio pri Pediatrio, konsciinte pri la perforto en amaskomunikiloj kiel signifa risko al la sano de infanaro kaj junularo, rekomendas, ke oni limigu la plentempon antaŭ ekrano (inkluzive de TV, komputiloj kaj videoludiloj) al du horoj tage.

## Agresa konduto

Serĉe de respondo, ampleksa studo realigata ekde julio 2005, fare de esploristoj ĉe Fakultato Rutgers (Nov-Ĵerzejo) kaj ĉe Universitato de Miĉigano, ambaŭ en Usono, indikas novajn evidentaĵojn pri la temo. La esploro, klarigas, ke eĉ kiam aliaj faktoroj estas konsiderataj — kiaj problemoj akademiaj, emociaj kaj influoj venintaj el perforto en la komunumo —, *"la prefero al perforta komunikilo montris indikon de perforta konduto kaj ĝenerala agresemo"*.

La profesoro pri Psikologio, **Paul Boxer**, komentante la laboron gvidatan de li, substrekas: *"La plejparto el la studoj pri la rolo de amaskomunikila perforto en la konduto de gejunuloj, ordinare, okazas en laboratorio sen interago kun la celpubliko"*.

Ekde 2004, Boxer sin dediĉas al esplorado pri perforto en komunikiloj kaj ilia influo sur la krima konduto de gejunuloj. La sciencisto konsideras, ke, malgraŭ tio ke gejunuloj ne estas *"devigataj spekti perforton en televido, la fakto, ke ĝi estas tiel evidenta en amaskomunikiloj igas ĝin tre populara ĉe ili"*.

**"Estas nenia avantaĝo en tio, ke infano spektu perfortajn TV-programojn, filmojn kaj/aŭ ludu per tiaj ludiloj. Estas nenio pozitiva en tio por ĝi. Tio nur stimulas malamikajn pensojn kaj plifortigas negativan sintenon"**

**Paul Boxer**

Profesoro pri Psikologio de Fakultato Rurgers, de Usono.



La sciencularo konkludis, ke programo kun pli alta grado de perforto helpas al antaŭvido de agresemaj kondutoj. Aliflanke, gejunuloj ne submetitaj al perforta komunikilo ne emas al negativaj kondutoj. La konkludoj de tiu esploro montras, ke la tuta socio devas konsideri tiujn faktorojn, ĉar granda estas la respondeco de amuzmedioj, de edukistoj kaj ĉefe de gepatroj.

*"Estas nenia avantaĝo en tio, ke infano spektu perfortajn TV-programojn, filmojn kaj/aŭ ludu per tiaj ludiloj. Estas nenio pozitiva en tio por ĝi. Tio nur stimulas malamikajn pensojn kaj plifortigas negativan sintenon"*, argumentis Paul Boxer.

Tiu rezonado harmonias kun la vortoj de la ĵurnalisto kaj verkisto Paiva Netto, direktoro-prezidanto de Legio de Bona Volo, okaze de la inaŭguro de la Eduka, Klereca kaj Komunuma Centro de la Institucio en Rio-de-Ĵanejro/RJ, la 2an de marto 1996. En la okazo, antaŭ pli ol 110 mil personoj, li proponis tiun pripenson: *"(...) Oni plendas ke surstrate infanoj kaj junuloj ŝtelas, mortigas, invadas domojn, ĝenas aliajn infanojn kaj junulojn kun pli bonfartaj vivrimedoj. Ili tamen disvolvas ĝuste tion kion oni havigas al ili. Se oni regalas ilin per rubaĵo, kiamaniere ili rekompencus? Kial do plendi? Tiu temo pri infaneco kaj juneco surstrate meritas seriozan pripenson, por ke*

## La esploro

Pli ol 800 adoleskantoj estis intervjuitaj en la ŝtato Miĉigano, en Usono — 430 mezlernejanoj el urbaj, ĉirkaŭurbaj kaj kamparaj komunumoj, kaj 390 junaj deliktuloj areste tenataj en municipaj kaj ŝtataj institucioj. Ankaŭ la gepatroj de 720 el tiuj gejunuloj intervjuiĝis, same kiel instruistoj de 717 el ili.

La demandoj prezentitaj al la gejunuloj temis pri preferataj programoj en televido, filmoj, videoludoj kaj komputiloj, ekde infanaĝo ĝis adoleskanteco. Oni demandis ankaŭ ĉu ili jam implikiĝis en iu tipo de fizika perforto aŭ kontraŭsociaj kondutoj, kiel ĵeti ŝtonojn aŭ uzi armilon.

La fakula skipo esploris la risko-faktorojn por agresaj kondutoj aŭ emociaj perturboj ĉe adoleskantoj. Ankaŭ gepatroj kaj instruistoj estis demanditaj pri tio kion ili observis el la konduto de la fil(in)o aŭ lernant(in)o.

La studo enfokusigis la fizikan perforton en televidaj programoj, videoludoj, retejoj kaj retaj ludiloj plej uzataj de la gejunuloj. La plivastigo de perfortoj en spektakloj, interreto, videoludoj kaj filmoj estis klasigita laŭ kodosistemo varianta de nulo (sen fizika perforto) ĝis kvar (pli alta nivelo de fizika perforto).

*oni metu en praktikon konvenajn decidojn."*

Konatiĝinte kun tiuj vortoj de Paiva Netto, la psikologiisto Paul Boxer tiel komentis: *"Jen justa paralelo. Perforta komunikilo estas rubaĵo laŭ tiu perspektivo. Ĝi produktas perforton, kiu ankaŭ estas rubaĵo, laŭ tiu senco, ke ĝi estas ne dezirata por la socio. Se ni do anstataŭigos ĝin per pozitiva komunikado, tio aliigos la konduton de tiuj infanoj. Certe la socio nur ricevos ian utilon, se la novaj generacioj estos malpli kaj malpli submetitaj al perforta amaskomunikilo".*

La zorgo pri la formado de ekumena civitaneco de la junularo, ne forgesante tiun civitanecon de la Spirito — kiel difinas Paiva Netto —, devas koncerni ĉiujn, kaj registarojn kaj familiojn. Kiel memkompreneble neniu socio ricevos ian utilon el junularo agresema, ribeliĝinta kaj perfortema.


Ankoraŭ reliefigante la penson de la ĉefgvidanto de LBV, indas substreki elprenon de lia artikolo "Ekvilibro kiel celo", kompilita surbaze de improvizaĵoj fare de la aŭtoro en la 1990-aj jaroj, per kiuj evidentiĝas la vojo al ŝanĝiĝo: *"La kompreno fare de popolamasoj survojas al maturiĝo, ĝis ili konscios pri la valoro de civitaneco, vastasence, ĉar ne sufiĉas konsideri civitanon nur laŭ lia fizika aspekto, sed ankaŭ laŭ tiu spirita, tial ke iu ajn ano de la homaj grupoj konsistas, resume, el korpo kaj Animo. Efektive, laŭ origino ni estas Spirito".* ■

La 28an de aŭgusto 2003, en la urbo Novporto, en Tenesio, du adoleskantoj estis akuzitaj pro pafado, kiu mortigis unu viron kaj vundis unu virinon. La knaboj pravigis sin ke la ideo por la delikto venis el videoludo kun alta nivelo de perforto, en kiu la ludisto bezonas akiri sufiĉe da mono por atingi la sekvan stadion de la ludo. Por tia celo la ludisto povas ŝteli aŭtojn, pafi, pugnbati kaj mortigi personojn, inter aliaj krimaj agoj (Gallup Opinienketo, 2003).



*Baldaŭ*

# FURORA BELETRA VERKO NUN EN ESPERANTO!




Brazila verkisto kiu disvendis pli ol 4 milionojn da libroj en Brazilo kaj eksterlando, Paiva Netto lanĉas esperantlingve sian furoraĵon "Meditadoj el la Animo". Tiu verko jam superis 400 milojn da ekzempleroj venditaj en Brazilo kaj Portugalio.

Ĉiu penso proponita de la verkisto Paiva Netto alportas al ni rimedojn por reakiri la konscion pri nia interna mio kaj instigas nin serĉi la veron ene de ni. Prezentataj per simpla maniero, tiuj gravaj instruoj tuŝas nian koron samtempe kaj neforviŝeble. *Meditadoj el la Animo* certe helpos vin kompreni vian propran spiritan naturon kaj vian rolon en ĉi tiu mondo.

Baldaŭ: poŝversio. Ĝi estos disponebla ankaŭ kiel e-libro.
Rezervu tuj la vian: esperanto@bonavolo.com

# LBV

# Ekumena Frateco kie

## Portugalio










Fotoj: Arkivo BV

**(1)** Kelkaj el la zorgataj infanoj de LBV en la programo *Semo de Bona Volo*, en la urbo Porto. Tie la organizaĵo ricevas geknabojn aĝantajn inter 6 kaj 12 jaroj, ĉe kiuj oni realigas aktivadojn kulturajn, pedagogihelpan, nutran kaj aman, cele al formado de la Ekumena Civitano. Sekvas ekzemploj de servoj enkadre de la programo *Feliĉa Rideto*, kiu respondecas pri kampanjoj por informado, prevento kaj prizorgo de buŝhigieno, ofertataj al malriĉaj komunumoj en la urboj Lisbono, Porto kaj Koimbro. Danke al tiu iniciato, **(2 kaj 3)** la infanoj ekde frua aĝo lernas pri la ĝusta dento-purigado. **(4)** La Cirkulanta Asistejo pri Buŝa Sano, de LBV, senpage venigas tiun servon al lernejoj, infanvartejoj, organizaĵoj kaj asocioj. La laboro de la Institucio en Portugalio inkluzivas ankaŭ **(5)** disdonon de baznutraĵo al familioj en situacio de socia risko. **(6)** Virinoj produktas manartaĵon dum unu el la aktivadoj de la programo *Vivu Plu!*, kiu inkluzivas la agadojn de LBV favore al triaĝuloj. Per tiuj aktivadoj oni celas plibonigi la memestimon de la partoprenantoj, instigante ilin teni sin aktivaj, per valorigo de siaj profesia kaj persona spertoj, kaj kontribui al la socio per volontulaj laboroj.

# la popolo bezonas



4


5

— Kadre de la programo *Unu Paŝo Antaŭen*, la Legokapabligo por Plenaĝuloj venigas al la favoratoj la okazon regi la legadon per semajnaj lecionoj okazantaj en la Socia Centro de LBV, en Porto.

— *Bebo-Civitano*: havigas antaŭnaskiĝan diagnozon al gravedulinoj kaj orientadon al patrinoj kaj al familioj pri bebaj zorgoj. Per tiu programo, gepatroj en situacio de socia vundebleco ricevas centojn da bebaĵoj, tutaj bebokompletoj por siaj idoj (ĉareto, bankuvo, vestetoj, vojaĝosakoj, vindaĵoj, lakto, kaj aliaj necesaĵoj).


6

# Usono

Fotoj: Arkivo BV








La bildoj montras iom pri tio kion reprezentas la agado de LBV en Usono. **(1, 2, kaj 3)** La programo *Rondirado de Karitato* venigas manĝojn, vestojn, moralan apogon kaj spiritan konsolon al strato-loĝantoj, ĉefe en la malvarmaj noktoj de Novjorko kaj Nov-Ĵerzejo. Aldone al la urĝa helpo, estas ankaŭ la zorgo instrui la civitanon mem disvolvi sian povon kaj lertecojn por ke li povu garantii sian propran subtenon. Volontulino de la Institucio enpakigas vestojn, kiujn oni donacis al popolamasoj spertantaj veaĵojn, kiel okaze de la fortaj pluvoj, kiuj damaĝis plurajn brazilajn ŝtatojn, kaj okaze de la ruiniga tertremo en Haitio.







La testoj disponigataj de *SAVE* estas senpagaj kaj helpas al prevento de mamkancero kaj uterkancero. Kadre de la programo, la cirkulanta asistejo de la Universitato de Nov-Ĵerzejo veturas ĝis LBV de Usono, kun sia moderna aparataro, por plenumi asiston ankaŭ senpagan. Ĝi realigas ankaŭ la programon *Stop* (Ŝpari Tempon por Prevento), kiu proponas prelegojn kaj senpagajn sangtestojn cele al prevento kaj frua malkovro de diversaj malsanoj, inter kiuj la malsanoj sekse kontaĝaj.

Unu el la programoj realigataj de la usona LBV estas la *Ĝardeno de Bona Volo kaj de Paco*, okazanta en la lernoĉambroj de la usonaj publikaj lernejoj (maldekstraj fotoj; infanoj kun la revuoj *Tutmondigo de la Frata Amo* kaj *Paco por la Jarmilo*, publikigaĵoj de LBV senditaj al UN). La juna legianino Mariana Malaman estas unu el la volontulinoj, kiuj aplikas la kulturajn kaj beletrajn aktivadojn, per kiuj oni celas disvolvi ian kritikan rigardon kaj pensigi manierojn plivastigi la Kulturon de Paco.



Maria de Albuquerque



Arkivo BV





Fotoj: Arkivo BV



Supre reliefe, lernantoj de la Infanlernejo Jesuo, de LBV, en Bonaero. Flanke, infanoj helpataj de la Institucio kadre de la programo *Semado por la Estonteco, Edukado per Valoroj*. Malsupre, de asistado al komunumoj en situacio de socia risko, per la tradicia programo de LBV *Rondirado de Karitato* kaj per la senpaga kurso pri kuirado kaj pastobakado.



Ĉiumarde kaj ĉiuvendrede, la argentina LBV elsendas la radioprogramon "Tuta Ekumenismo", kiu havigas al la aŭskultantoj spacon por meditado kaj integriĝo kun Dio, per legado de la Sankta Biblio kaj per la pova Ekumena Preĝoĉeno, en kiu skribiĝas la nomoj de la amataj estuloj kaj de ĉiuj aŭskultantoj dezirantaj partopreni ĝin. Per la programo oni pritraktas ankaŭ ĉiutagajn temojn, kiuj kontribuas al la kompleta elvolviĝo de la Homo laŭ vidpunkto de la Ekumena Spiritualeco.

Programa
Ecumenismo Total
El poder de la Fe que realiza
FM DAKOTA 104.7



## Argentino

## Paragvajo

Fotoj: Arkivo BV







**(1)** Volontulino de LBV gvidas ludaktivadon en la lernejo Patrino Tereza el Kalkuto, en Ciudad del Este. **(2)** Dum la kampajno *Bona Volo en Agado*, la paragvaja LBV okazigas prelegon en la Lernejo San Miguel, en la urbo San Antonio, kie ĝi ankaŭ disdonas baznutraĵon al malriĉaj familioj. **(3)** Kelkaj lernantoj de la Infanvartejo kaj Antaŭlernejo José de Paiva Netto, situanta en Asunciono. **(4)** Dentistoj kaj sanigistoj instruas al lernantoj de la Lernejo San Jorge la ĝustan buŝpurigadon enkadre de la kampanjo *Ni Lernu Rideti*. **(5 kaj 6)** Livero de lernotekoj de la kampanjo *LBV: Edukado en Agado*, samtempe okazanta en la lernejoj Santa Teresita del Niño Jesús, en San Lorenzo, kaj en Cable Gui, en Asunciono.







# Bolivio







Fotoj: Melina Valencia







**(1)** Volontulo de LBV disdonas nutraĵon kaj vestojn en la Ciudad del Alto, enkadre de la programo *Reto de Kunhelpado*. **(2 kaj 3)** Dentistoj kaj volontulaj sanigistoj okazigas prevento-prelegojn pri buŝhigieno, en Ciudad del Alto, enkadre de la kampanjo *Dentoj puraj, infanoj sanaj*. **(4 kaj 5)** La kampanjo *Vintro sen malvarmumo* orientas familiojn kaj instruistojn pri la simptomoj, kaŭzoj kaj sekvoj de spirakutaj malsanoj, cele redukti la nombron de tiuj malsanuloj; dum la kampanjo oni disdonas ankaŭ vintrajn vestaĵojn. **(6)** Disdono de baznutraĵo. **(7 kaj 8)** Infanoj helpataj en la Infanvartejo Jesuo, en la bolivia ĉefurbo.












# Urugvajo

Fotoj: Arkivo BV





En 2007, la iama ambasadoro de Japanio en Urugvajo, s-ro **Masami Takemoto**, prelegas en la inaŭguro de la lernejo de LBV.








La legiano de Bona Volo **Alziro de Paiva** kaj la respondeculo pri la paragvaja LBV, **Maciel Ferreira**, malligas la inaŭguran rubandon akompane de lernejanoj.




**(1)** Fasado de la Eduka kaj Klereca Instituto de LBV en Montevideo. Per ĝia inaŭguro (29/06/2007) oni omaĝis la direktoro-prezidanton de LBV, Paiva Netto, pro lia 51-jariĝo da laboro en la Institucio, kompletigita en tiu dato. Sekvas kelkaj el la programoj realigataj de la Instituto de LBV: **(2)** komunuma biblioteko; **(3)** psikomova ĉambro, spaco por ludoj kaj aliaj fizikaj aktivadoj, kie la knabaro povas testi kapablojn el sia propra korpo; kaj **(4)** unu el la kvin lernoĉambroj de la Infanvartejo Jesuo, kiu ĉiutage gastigas, plentage, 120 infanojn aĝantajn inter 2 kaj 5 jaroj.



# Newton, Einstein
## kaj "la perspektivo de kono"

Arkivo BV




Juliano Carvalho Bento, Bakalaŭro pri Fiziko en UNICAMP

*"Qui genus humanum ingenio superavit*."* Kiu vizitos la kapelon de Trinity College, en la Universitato de Cambridge, Anglujo, tiu sin trovos fronte al tiu frazo, ĉe la piedoj de grandega statuo de **Isaac Newton** (1643-1727), kiun oni konsideras la patro de fiziko pro la alta nivelo de liaj verkoj, kiel *Philosophiae Naturalis Principia Mathematica* (Matematikaj principoj de natura filozofio). Antaŭ tiu bela artaĵo, multaj homoj eble analizus ĝin konsiderante diversajn aspektojn. *"Vidu la firman rigardon"*, iuj dirus; aliaj: *"Kiom da vestoj, unu sur la alia!"*; kaj ankoraŭ aliaj demandus: *"Kion li havas enmane?"*. Estus krome homoj, kiuj ne atentus la artaĵon, sed la latinan frazon, ĉi-supre transskribitan, kiun oni povus traduki: *"Per sia inteligento li superis la homan genton"*. Ĉu efektive?

Ni tute ne dubas pri la intelekta kapablo de la geniulo pri fiziko, kaj ni tute ne emas kompari aliajn inteligentulojn kun li, male mi aludas tion precize por analizi ian specialan kvaliton de tiu sciencisto. La scienco mem klarigas, ke grandaj malkovroj okazis pro interpreto, kiel ni vidos. Literaturaĵo, ekzemple, povas alporti tre malsamajn interpretojn al malsamaj homoj; muzikaĵo eble plaĉas al iuj oreloj, sed sonas kiel nuraj bruaĵoj al aliaj. La leganto mem de ĉi tiu teksto eble observas iujn aspektojn, kiujn ne atentis eĉ la verkinto. Tio okazas, ĉar ĉiu homo prezentas unikajn ecojn, unu estulo estas malsama ol ĉiuj aliaj, kaj tio cetere estas belega afero, ĉar ĝi faras, ke la mondo serĉu novajn kulturojn, ideojn, kaj malfermon al konoj neniam antaŭe imagitaj, per malsamaj vidpunktoj.

Se objekton (statuon, ekzemple) oni povas vidi laŭ pluraj manieroj, kion do diri pri frazo, teksto, aŭ eĉ mekanikaĵo?

Ni do revenu al la analizo pri la frazo ĉe la piedo de la statuo. Ĉu ni povus tutcerte aserti, ke neniam ekzistis intelektulo pli altnivela ol Newton? Laŭ fizikistoj – kvankam ili ankoraŭ konsideras lin kiel unu el la plej grandaj sciencistoj – certe partoprenas tian grupon **Albert Einstein** (1879-1955), pro la multenombraj altvaloraj verkoj, inkluzive de tiuj, kiuj plibonigis la heredaĵon de la angla fizikisto mem. Tiurilate, ni rajtas konsideri, ankoraŭ, ĉi tiun aserton de la patro de relativeco: *"Miaj ideoj igis la homojn reekzameni la fizikon de Newton. Kompreneble, iam estonte oni reekzamenos ankaŭ miajn proprajn ideojn. Se tio ne okazos, grava manko ie troviĝos"*.



Reprodukto BV

Sciencisto Albert Einstein kaj kelkaj el liaj manuskriptoj.


Kion tio sugestas al ni? Ke kono ne estas io absoluta, limigita kaj imuna al eraroj. Male. Laŭ analizo proponita de la Homoj mem – kiuj ofte bezonas rezigni pri prudento aŭ pri tio, kion ili komprenas kiel realon por eniri ian novan aspekton de realo – la proceso de aliro al vero, precipe se ĝi estas eksperimenta, baziĝas sur interpretado. Jen kial necesas teorioj por ekspliki tion, kio okazas en la naturo.

Do, ni alvoku la homajn

* ***Qui genus humanum ingenio superavit*** **–** Traduko: "Per sia talento li superis la homan genton", skribaĵo videbla sur la piedestalo da la statuo de Isaac Newton estas originale prenita el la poemo de **Lukrecio** (98-55 a.K.) *De Rerum Natura* (Pri la naturo de la aĵoj), per kiu la latina aŭtoro elmontras la filozofion de la heleno **Epikuro el Samoso** (341-270 a.K.)

ekzemplojn jam menciitajn, kaj ni ligu ilin al Historio, por pliriĉigi ĉi tiun punkton. En la 17-a jarcento, nederlanda fizikisto **Christian Huygens** (1629-1695) proponis teorion por priskribi la lumon, dirante, ke ĝi fakte estas ondo, kiu etendiĝas en *"lumpova etero"*, same kiel ondoj de akvo.

En tiu sama jarcento, Newton liveris eksplikojn pri novaj fenomenoj ligitaj al lumo per sia nova verko *Opticks* (Optiko). Li asertis, ke efektive eblas ekspliki lumon ne kiel ondojn, sed kiel faskon de partikloj, kaj tiel li ellaboris ian novan modelon por priskribi tion.




Arkivo BV

Fronte al la granda famo de la proponinto de teorio pri gravito, malmultaj voĉoj manifestiĝis kontraŭ tia modelo dum pli ol 100 jaroj. Nur en la komenco de la 19-a jarcento la anglo **Thomas Young** (1731-1777) kaj la franco **Augustin Fresnel** (1788-1827) ellaboris teorion pri ondoj, kiu ne nur eksplikis la eksperimentojn de Newton, sed ankaŭ malfermis novajn eksperimentojn, kaj krome permesis kalkuli, per tiu metodo, la supozatan longon de la lum-ondo.

Pro la eksterordinara sukceso de la ondo-teorio, ĉi tiu venkis, kaj oni akceptis ĝin dum la tuta 19-a jarcento. Nur en la komenco de la 20-a jarcento la juna germana fizikisto Albert Einstein pruvis, ke fakte lumo estas nek ondo, nek partiklo: ĝi estas ambaŭ! En iuj momentoj, lumo aperas kiel partiklo kaj en aliaj ĝi aperas en formo de ondo; tiun principon oni nomis *"Ondo-partikla Dualeco"*; poste oni konstatis, ke tio validas por ĉiuj subatomaj partikloj.

Laŭ tio, kion oni observas, branĉoj ŝajne tute kontraŭaj montriĝis per unu sola efika formo, tiel ke oni komprenas la proceson de iu fakto en la Naturo, ĉi-okaze la konsisto de lumo. Kion konkludi el tio? Ke la Homo ne vidatingas la plenan konon, sed fakte nur unu aspekton de ĝi.Tion proponas la verkisto kaj ĵurnalisto Paiva Netto, per sia artikolo "Ecce Deus!": *"(...) Neniu posedas Veron, nek povas akapari scion, ĉar en ĉi tiu mondo ekzistas nur aspiro al ĝi."* Kaj konkludas


Arkivo BV

Eksperimento de Newton pri la vido de la spektro de lumo, per prismo.

la ĵurnalisto per la teksto nomata "Urĝas reeduki!": *"(...) Tio klarigas kial ni ankoraŭ ĝuas nur ĝian atendon, ne la Konon mem, en larĝa senco, kio estus plonĝo en la Dian Scion; per korpo kaj Animo, sinbano en la luma maro de Saĝeco de Dio."*

Sekve, se iu homo prezentas teorion aŭ fakton kiel definitivan, veran kaj eternan, tio signifas sin direkti al nesciencaj lokoj, for de tio, kion montras al ni la objekto de studoj de Scienco kaj de Isaac Newton mem, kiel esprimas ĉi tiu frazo, same disvastigita en la verkoj de verkisto Paiva Netto: "*Mi ne scias, kiel tio aspektas antaŭ la okuloj de la mondo, sed antaŭ miaj mi ŝajnas knabeto ludanta ĉe la maro, amuzanta sin pro la fakto, ke li trovas foje iom pli glatan ŝtoneton, aŭ iom pli belan konkon, dum la granda oceano de vero restas tute ekster mia kono, antaŭ mi"*.

Saĝa Newton, kiu fariĝis eĉ pli granda pro tio, ke li sin tenis humile fronte al la grandeco de kono kaj eĉ de ĝiaj perspektivoj. ■

La Soldatetoj de Dio celebras 61-jaran jubileon de Legio de Bona Volo pro ĝia senlaca laborado por iu pli bona mondo kaj por ia pli feliĉa Homaro, laŭ la instruoj de la Kara Amiko Jesuo, la Ekumena Kristo!



# La Dek Ordonoj de la Soldatetoj de Dio

Alziro Zarur (1914-1979), karmemora fondinto de LBV.



I – Amu Dion super ĉio.

II – Vivu laŭ la Evangelio de Jesuo je Spirito kaj Vero, sub la lumo de Lia Nova Ordono.

III – Flegu Bonan Volon en ĉiuj momentoj de la vivo.

IV – Faru Brazilon la Patrolando inter Patrolandoj — la Koro de la Mondo.

V – Respektu la religiojn de infanoj de la tuta Homaro.

VI – Frate ĉirkaŭbraku la idojn de riĉuloj kaj de malriĉuloj, de blankuloj kaj de negroj, de flavuloj kaj de mestizoj.

VII – Honoru vian patron kaj vian patrinon, kaj ĉiam obeu ilin.

VIII - Senĉese studadu, elstarigante viajn instruistojn.

IX – Plenumu el via tuta koro la Ordonojn de la Dia Leĝo.

X – Aldonu al ĉiuj viaj agoj la Novan Ordonon de Jesuo: *"Amu unu alian kiel Mi amis vin. Nur per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj. (...) Neniu havas Amon pli grandan ol tio, ke iu demetus sian vivon por siaj amikoj"* (Evangelio de la Kristo, laŭ Johano, 13: 34 kaj 35 kaj 15: 12 kaj 13).





Rio Tókio, Narita e Honda.
Aqui sobra boa vontade para você sair com os mais desejados do Brasil.
GARANTIA 3 ANOS
NEW CIVIC
O CARRO MAIS DESEJADO DO BRASIL ESTÁ NA RIO TÓKIO E NARITA.
GARANTIA 3 ANOS
CR-V
NOVA CR-V 2009 NAS VERSÕES 4X2 E 4X4
O carro certo para quem procura mais conforto e estilo.
GARANTIA 3 ANOS
Accord
ACCORD EX 3.5 V6 24V 278CV
Elegância e tecnologia para quem quer voar mais alto.
FIT
Estilo, esportividade e versatilidade.
GARANTIA 3 ANOS
PROGRAMA Honda Conduz
Atendimento especializado para pessoas portadoras de necessidades especiais, com superavaliação do seu veículo na compra de um Honda 0km e isenção de impostos (IPI, ICMS e IPVA).
Consórcio Nacional Honda
PARCELAS A PARTIR DE: 749,14*
TOTALMENTE SEM JUROS - ENTREGA GARANTIDA PELA FÁBRICA - MENOR TAXA DE ADMINISTRAÇÃO DO PAÍS - MAIOR CONSÓRCIO DA AMÉRICA LATINA COM MAIS DE 1,5 MILHÕES DE CLIENTES ATIVOS RESULTADOS DAS ASSEMBLÉIAS E IMPRESSÃO DO BOLETO DE PAGAMENTO PELA INTERNET.
A MANEIRA MAIS BARATA E INTELIGENTE PARA PROGRAMAR A COMPRA DO SEU NOVO HONDA.
HONDA
Rio Tókio • Botafogo
Rua General Severiano, 201
21 2122-4999
www.riotokio.com.br
Narita • Barra
Avenida das Américas, 2.001
21 3987-8888
www.hondanarita.com.br
Rio Tókio • Recreio
Avenida das Américas, 14.001
21 2323-9000
www.riotokio.com.br
O valor de R$749,14 refere-se a 75% da carta de crédito para aquisição do New Fit 1.4 Mecânico 101 cv Flex 2009/2009 com valor de crédito de R$38.883,75. Reservamo-nos o direito de corrigir possíveis erros de digitação. Ofertas válidas até a data da publicação. Fotos meramente ilustrativas.